


LEGAĴOJ XIII.



kolektis por amikoj

Jindřiška Drahotová
drahotova@esperanto.cz

Ĉiu povas uzi la tekstojn laŭplaĉe CC

Presite en presejo Ĉistá ĉe Mladá Boleslav 2024.

Leĝo de Tempo

Ne penu eskapi, la Tempo vin kaptos kaj viajn harojn
argentumos.
Ĝi donos al vi ĝojon eĉ malĝojon de amo
Kaj desegnojn sulkojn en vian vizaĝon.
Vane vi obstinos, vanaj viaj fortoj, ni ĉiuj akiros celon.
El ĉio malbona al bona ŝanĝiĝos, mi donos vin konsilon:
Neniam konkuru kun Tempo, vivu nun kaj ĉi tie!
La vivo mallongas. Iru antaŭen, ne rerigardu!
Ne timu, trankvile dormu, okazos nur kio okazi devas.
La leĝo de tempo apartenas al ni ĉiuj,
Ĝi venos kaj prenos nin.

La tekston mi trovis sur muro de mia amikino.
Mi tradukis ĝin. JoDo

Sur la kajo

PhDr. Tomáš Beník. Bratislava. 2023

Maja suno dum tuta vojo al stacidomo celis miajn okulojn per forto de la plej akra glavo. Malrapide ĝin kovradis pezaj grizaj nuboj. La ŝtormo kiu proksimiĝis, povis influi niajn vivojn kaj dum unu sekundo ilin neigi, sed homoj sur la kajo pri ĝi ne interesiĝis. Ĉiuj pensis pri io tute alia. Regis ilin malgajo kaj larmoj.. Okazis malfacilaj, dramaj adiaŭoj, scenejoj, kiuj estis videblaj nur sur malnovaj fotoj aŭ filmoj. Nun ili revenis en realon al rektan bildon.

La malgajo kaptis ankaŭ min. Dum vojo al stacidomo mi sukcesis ĝin elpeli, ĉar mi hastis por atingi trajnon. Kiam mi nune pri tio pensas, kial mi tiel hastis? La respondo estis simpla. En mia valizo estis urĝa ordono al armeo. Kial mi kunportas valizon, ja mi sciis, ke oni ĝin de mi forprenos kaj mi ricevos uniformon? Kial mi tamen ellitiĝis kaj decidis foriri? Ĉu vere havas papero tian grandan forton? Sed en mia eno ekzistas io kiel diktatoro. La samo okazis ĉe aliaj genujuloj kaj viroj kun similaj paperoj. Jen same agis mia patro kaj ĉiuj niaj antaŭuloj.

Miaj okuloj serĉis mian Sonjan. Ŝi alkuris al mi kaj kun angoro kaj timo en okuloj kaptis min. Mi ne timis pri propra vivo, ĝin mi neglektis, mi sentis, ke mi travivas lastajn kvin minutojn en nia kunvivo. La timo pri ŝi vastiĝis. Mi volis fuĝi de trajno kaj resti kun ŝi, sed mia korpo pretigis envagoniĝi, la koro forte batis.

Ni laste brakumis, kisis ... Mi promesis zorgi pri si ... Mi promesis, ke mi revenos ...

Mi volas kredi, ke la promeson plenumos ...

OOO

La vendisto de la feliĉo

Julian Modest

En la urba bazaro, ĝuste tie, kie estas la lastaj vendotabloj, troviĝis eta vendejo, en kiu maljunulo vendis feliĉon. Mi miris, kiel eblas vendi feliĉon kaj kiuj aĉetas feliĉon, tamen antaŭ la vendejo 44 ĉiam atendis multaj homoj. Ja, iuj vere bezonas feliĉon. Iam mi decidis eniri la etan vendejon kaj kompreni, kiel la maljunulo vendas feliĉon. Kompreneble mi bone sciis, ke ne eblas vendi aŭ aĉeti feliĉon, tamen mi estis ege scivola. Kiam mi ekstaris antaŭ la vendejo, estis tagmeze kaj feliĉe ĉi tie ne estis aliaj homoj. Enirante la vendejon, mi iom miris. Mi supozis, ke ĝi estas malluma, mallarĝa, sed okazis, ke la vendejo estas vasta, pura, kaj la suno lumigas ĝin. Ĉe la granda fenestro pendis blankaj kurtenoj, en la mezo de la ejo staris ronda tablo kaj kelkaj seĝoj. Sur la muro, kontraŭ la pordo, estis bildo – montara pejzaĝo: arbaro kaj lago kun helblua kristala akvo. En la ejo sonis muziko. Ŝajnis al mi, ke neniu estas ĉi tie, sed aŭdiĝis mola voĉo: – Bonan tagon, sinjoro, bonvolu.

Mi ĉirkaŭrigardis kaj rimarkis, ke en la angulo, proksime al la fenestro, staras maljunulo. – Bonan tagon – salutis mi lin. – Mi venis por vidi kiel ... – provis mi klarigi, sed la maljunulo interrompis min: – Kiel mi vendas feliĉon?

– Jes – diris mi.

– Bonvolu – kaj li proksimiĝis al mi. Ne eblis diri, kiom jara li estas. Ĉu sepdek aŭ okdek. Malalta kun

hararo blanka kiel arĝento kaj kun okuloj, kiuj havis la koloron de la lago sur la pejzaĝo. Li estis preskaŭ elegante vestita, malgraŭ ke lia grizkolora kostumo aspektis iom eksmoda. Lia ĉemizo estis neĝblanka, lia pantalono precize gladita, kaj li havis malhelflavan kravaton. La maljunulo atente rigardis min de la kapo ĝis la piedoj eble por diveni, ĉu mi havas sufiĉe da mono por aĉeti feliĉon. Dum li esploris min, mi rigardis la vendejon, en kiu ne estis kasregistriilo, nek aliaj varoj. Strange, preskaŭ nenio estis en la ejo kaj mi daŭre demandis min, kie estas la vendata feliĉo kaj kion ĝuste vendas la stranga maljunulo.

– La feliĉo – ekparolis mallaŭte la viro – eble por averti min – estas tre multekosta! Jes, oni devas bone pripensi, ĉu oni povas posedi ĝin. Mi deziris denove diri al li, ke mi ne intencas aĉetadi, sed venis pro scivolo, tamen la maljunulo kvazaŭ divenis miajn pensojn kaj daŭrigis: – Ĉiuj venas ĉi tien pro scivolo, ĉar neniu kredas, ke la feliĉo estas vendebla kaj aĉetebla, sed kiu venas ĉi tien, mi unue demandas lin aŭ ŝin, kian feliĉon li aŭ ŝi deziras, ĉar estas diversaj feliĉoj: feliĉo pro sano, feliĉo pro riĉeco, feliĉo pro amo, feliĉo pro bona familio ... La feliĉo estas unusola. Ekzistas multaj diversaj feliĉoj, tamen mi vendas nur unu feliĉon, ĉu pro amo, ĉu pro sano, ĉu pro riĉeco ... Ne ekzistas feliĉo pro ĉio en la vivo. Multaj aĉetantoj ne povas decidi, kian feliĉon ili deziras, kaj ofte ili foriras sen aĉeti feliĉon. Aliaj aĉetas ian feliĉon, sed poste ili bedaŭras, ke ili ne aĉetis la ĝustan feliĉon, kiun ili bezonas. - Eble vi scias, kian feliĉon vi deziras? – demandis la maljunulo.

Mi tuj respondis, ke mi tute ne pripensis, kian feliĉon mi deziras.

– Kiam vi decidis, kian feliĉon vi deziras, venu denove – diris la maljunulo kaj iom kapjesis por ĝisrevido.

Mi diris „ĝis revido” kaj iris el la vendejo. Irante sur la strato, mi daŭre meditis, kian feliĉon mi deziras: ĉu pro amo, ĉu pro riĉeco, ĉu pro sano ..., sed mi ne povis decidi. La maljunulo pravis: feliĉo estas nur unu, ne ekzistas multaj feliĉoj aŭ eble feliĉo tute ne ekzistas.



Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërisht sipas vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës Retpaĝo- Faqja në internet: <http://esperantoshqipria>. ILEI-Al: <https://eventaservo.org/o/ILEI-Albanio>

Feliĉaj maljunuloj

Ni, kiuj aĝas bele, ni havas ĉion pri kio ni revis antaŭ 60 jaroj. Ni nek devas viziti lernejon, nek laborejon. Ni ricevas poŝmonon kaj dece ni loĝas. Iuj eĉ posedas aŭtomobilon. Ni timas nek gravedon nek morton, ni havas feliĉon esti maljunaj. Nia vivo estas brila! Ni estas nekredeble saĝaj! Nia cerbo laboras iom pli malrapide, ĉar estas plenplena de scioj. Ni vere ne estas stultaj, nur ni devas pli longe serĉi faktojn inter scioj kaj spertoj. En niaj kapoj estas amaso de aferoj, kiuj premas nian orelon, kaj tio kaŭzas malplibonan aŭdpovon . Tio estas la sama afero, kiam „hard disk“ en komputilo malrapidas, ĉar enhavas tro multe da informaĵoj. Nia cerbo ne estas malforta, sed estas plenplena. Onidire, ke homoj de nia aĝo ofte malmemoradas, ion serĉas, ne kapablas rememori, vagas tra loĝejo. Kial estas tio? Tio ne estas problemo de memoro! Tio nur naturo trudas nin, ke ni pli moviĝu.



Mi ofertas kelkajn konsilojn:

Ekzistas tri aferoj, pri kiuj malmemoru:

1. Via aĝo
2. Pasinteco
3. Plendado

Tri gravaj aferoj:

1. Amikoj
2. Pozitiva pensado
3. Silenta kaj komforta hejmo



Viaj avantaĝoj:

1. Ridetu kaj ridu konstante
2. Gimnastiku, sed nur dum propra agrabla tempo
3. Pasu tempon kun amikoj, ne nur kun parencoj kaj nepoj

Kaj plu: Trinku pli ofte, dormu pli longe, ripozu, ne atendu miraklojn, ne perdadu fidon, tenu pozitivecon kaj esperu bonon!

JoDo.

Saĝeco de niaj geavoj

Ne necesas klarigi ion ajn al iu. Amikoj klarigon ne bezonas. Malamikoj ne kredos al ni. Stultuloj ne komprenos.

Globkrajono

László József Bíró (1899 Budapeŝto – 1985 Buenos Aires) estis ĵurnalisto kaj eltrovinto de globskribilo, devene judo. Principo de la globskribilo estas simpla. Bíró rakontis, ke li kaptis ideon, kiam li rigardis ludon de infanoj kun globetoj. Globeto, kiu trairis flakon de koto, lasadis post ĝi spuron.

Vojo al realigo de ideo ne estis rekta. Helpis frato de Laszlo, ĥemiisto kaj tempon prokrastis milito. En la jaro 1938 fuĝis Laszlo tra Parizo al Argentino, kie poste la globskribilo naskiĝis. La sukceso estis granda.

Licencon aĉetis brita aviadistaro. En Usono okazis skandalo en 1945, kie oni vendis globskribilojn multekoste, ĉar entreprenisto Milton Reynolds ŝtelis la eltrovon kaj akiris milionojn. Dume Bíró ricevis nur nun milionon je patentaj rajtoj.



Zdroj: https://www.idnes.cz/zpravy/zahranicni/laszlo-biro-klucove-pero-propiska-vyroci.A160929_112700_zahranicni_jpl

Por eldiri veron sufiĉas kelkaj sekundoj, kio daŭras tro longe, estas pravigado sin.

Svámidží hinda saĝulo.

Karaj verdaj raŭpoj, karaj papilioj

Hori Jasuo, 2023

En mia ĝardeno, estas multaj arboj, kiujn hirundovostaj amas, kiel japanaj piprujoj kaj mandarinuoj. Mi volas, ke la hirundovostaj papilioj venu kaj demetu ovojn, kaj mi volas kreskigi ilin. Mi antaŭe havis multajn raŭpojn ĉiun jaron, sed dum la lastaj 10 jaroj mi tute ne vidis ilin. Mi suspektis, ke tio estis pro la radiado de la nuklea akcidento.

Ĉi-jare, mi trovis kelkajn raŭpojn por la unua fojo post longa tempo, kaj mi tre feliĉas konservi ilin en mia ĉambro. La ĵus eloviĝintaj raupoj estas tro malgrandaj, do ili kresku en la japana pipro-arbo kaj ili eventuale fariĝos nigraj. Kiam ili fariĝas verdaj kaj grandaj, mi kaptas ilin kaj konservas ilin en mia ĉambro, ĉar se ili restos ekstere, foje lacertoj manĝas ilin aŭ hirundovostaj vespoj demetas ovon ĉe la raŭpoj kaj manĝas ilin. Mi konservas la raŭpojn en granda kartona skatolo kaj nutras ilin. Antaŭ ol ili krizalidiĝas, ili forlasas la foliojn kaj serĉas bonan lokon por krizalidi. Mi pensas, ke ili volas havi sufiĉe da spaco por siaj etendiĝontaj flugiloj. Kelkfoje ili eskapas el la skatolo. Unu el miaj raŭpoj gluiĝas al la kruro de la seĝo kiel vi povas vidi en la foto.

Estas tre malfacile vidi la raŭpojn krizalidiĝi, ĉar por tio mi devas rigardadi ilin seninterrompe. Mi vidis tion nur unu fojon. Raŭpo ĉirkaŭigas la fadenon el sia buŝo ĉirkaŭ la kolo, kaj la momenton, kiam la fadeno tuŝas la sulkon ĉe la kolo, ĝi ĉesas tiun agon, kvazaŭ ĝi dirus : "Mi sukcesis !" Vere tio estas spektaklo. La krizalidoj dormas aŭ maturiĝas dum unu semajno, kaj poste belaj papilioj aperas. Post apero, ili etendas siajn flugilojn, restas tie ĝis la flugiloj sufiĉe malmoliĝas, kaj poste forflugas en la bluan ĉielon.

Mi estas tre feliĉa en tiu momento. Mi vokas laŭte:
"Revenu al mia domo kaj demetu ovojn!"



Venenaj plantoj

Oldřich Arnoř Fischer

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 14-an de junio 2023

Kial kelkaj plantoj estas venenaj? Veneno estas substanco, kiu en organismo kaŭzas malsanon aŭ morton. Plantaj venenoj estas produktoj de metabolismo de plantaj ĉeloj, kiuj en plantaj organismoj ludas utilajn rolojn, sed en mambestaj organismoj kaŭzas sanajn problemojn, iam eĉ morton.

Printempe, kiam pluva akvo alportas en akvofontojn el kampoj sterkaĵojn, precipe fosfatojn, oni en staranta akvo povas observi verdan koloron. Tie vivas verdaj cianobakterioj (unuĉelaj plantoj). Kelkaj cianobakterioj produktas venenojn (fikotoksinojn), kiuj venenigas viandon de moluskoj, krustacoj kaj fiŝoj. Multfoje okazis, ke homoj, ekzemple maristoj, kaptis kaj manĝis fiŝojn, kiuj bele aspektis, havis bongustan viandon, sed la viando estis venena kaŭze de cianobakteriaj toksinoj. Krome la toksinoj, kiuj kaŭzas vomiton, laksojn kaj febron, estas signifaj toksinoj, kiuj influas psiĥikon, ekzemple dooma acido, kiu kaŭzas amnezion (perdon de memoro). Ankaŭ bakterioj kaj aktinomicetoj produktas danĝerajn toksinojn. Inter fungoj (neverdaj plantoj) estas multe da venenaj specioj. Verdaj plantoj povas esti nevenenaj, tute venenaj aŭ parte venenaj.

Al signifaj plantaj venenoj apartenas: alkaloidoj, glikozidoj, organikaj acidoj, venenaj aminoacidoj, peptidoj kaj proteinoj, terpenoj, lektinoj, esencoj, rezinoj, pektinoj kaj mukoj.

Homoj ofte veneniĝas, se ili opinias, ke venena planto estas nevenena planto.

Folioj de ajlo ursa (*Alium ursinum*). Kelkfoje homoj



kolektas anstataŭ vera ajlo ursa foliojn venenajn (*Colchicum autumnale*), kiu enhavas alkaloidon kolĥicinon. Tiu alkaloido bremsas dividon de ĉeloj en la stadio c-metafazo. Diferenco: folioj de ursa ajlo (*Alium ursinum*) havas longajn petiolojn kaj la planto floras × folioj de *Colchicum autumnale* sidas rekte sur kaŭloj, la planto floras nur aŭtune

(violokoloraj floroj).

Bulboj de terpomoj (*Solanum tuberosum*) kaj **fruktoj de tomatoj** (*Solanum lycopersicum*) estas manĝeblaj, sed aliaj partoj de tiuj plantoj estas venenaj. Sed kio estas venena por homoj, tio ne ĉiam estas venena ankaŭ por bestoj. Ekzemple larvoj de terpoma skarabo (*Leptinotarsa decemlineata*) voras foliojn de terpomoj kaj aliaj plantoj el la sama familio (Solanaceae). Plantaj venenoj povas venenigi bestojn, kiuj ilin voras.



Folilaŭsoj, kiuj suĉas fluidaĵojn de venena *Sambucus nigra*, fariĝas venenaj por kokcinoj (*Coccinella septempunctata*), kiuj pro tio ilin evitas. Orienta kokcino (*Harmonia axyridis*) estas rezista de sambukaj venenoj, pro tio kapablas vori sambukajn folilaŭsojn.

Junipero (*Juniperus communis* *Juniperus sabina*) Por preparado de alkoholaĵoj homoj misuzas fruktojn de junipero (*Juniperus communis*). Erare ili uzas venenajn fruktojn de *Juniperus sabina*. Tiu planto enhavas alkoholojn sabinolon kaj tujolon. Veneniĝo estas dolora, kun kramfoj. La venenoj de *Juniperus sabina* kaŭzas abortojn. Diferencoj: *Juniperus communis* pikas, ĝiaj fruktoj sur branĉetoj staras × *Juniperus sabina* ne pikas, ĝiaj fruktoj pendas.



La kvina gusto

J. Drahotová, 2023

La vorton „unami“ mi aŭdis antaŭ ia tempo en iu kvizo. Post kiam mi malsaniĝis per kovimo, mi pensis, ke mi la guston spertis. Vere aĉa sperto. Por mi sufiĉus nur kvar gustojn: acida, dolĉa, amara kaj sala. Krome la vorto unami sonas al mi ekzotike – kiel ia eksceso.

Hieraŭ mi devis longe atendi en denta konsultejo. Por utiligi tempon, mi prenis en manon kuŝantan tie gazeton kaj komencis legi longan artikolon pri la kvina gusto. Onidire oni povos ĝin gustumi en multekostaj restoracioj. Mi tralegis kelkajn komplikajn receptojn kaj eksciis, kiel kuiristoj specialistoj fabrikas specialajn cindrojn por akiri ingrediencon por tiu gusto unami, por krei frandaĵojn. En fino de la artikolo mi legis, ke gusto de cindro - unami estis kun ni de pratempoj, ĉar niaj antaŭuloj uzadis cindron por konservi nutraĵojn kune kun fumado.

Kia danĝero por planedo! Kun malemo mi la uzitan gazeton demetis.



Kurba bastono faras kurban ombron.

Neniam pravigu kurban ombron de la bastono!

Kiel mi pasis dimanĉon

Jarka Malá, Ĉeĥio. 2023.

Estis somero. Dimanĉe mi vekiĝis kun doloro sub koro. Mi nenion atendis kaj prenis pilolon kontraŭ doloro. Post kelkaj dekminutoj nekutime la doloro ankoraŭ daŭris. Poste mi matenmanĝis kaj prenis miajn tagajn medikamentojn. La doloro daŭris.

Mi serĉis la kialon, sed mi nenion trovis. Do, mi cerbumis kaj kiam mi nenion nekutiman trovis, mi timis la duan infarkton kaj mia edzo ordonis al mi voki rapidan sukuron. Mi faris tuj, ili venis tuj, ili mezuris mian agadon de koro, preparis dokumenton por kuracistoj en hospitalo kaj venigis min tien. La ambulanco (malsanveturilo) ne estis bele ekipita, kiel mi konis kaj mi suferis eĉ pli, ĉar la aŭto devis trairi multajn vilaĝojn. Sed ili sukcesis apliki al mi en vejnon la medikamenton: fiziologia solvaĵo (solutio - akvo kun 0.9% de salo).

En hospitalo ili denove mezuris mian korpan staton, ĉio bonis, sed la doloro daŭris. Ili prenis mian sangon kiel specimeno por laboratorio. Ili inspektis mian ventron, mian tutan korpon. Ili nenion trovis kaj la doloro daŭris. Mi jam estis preskaŭ du horojn en hospitalo, la kuracisto faris ĉion por inspekti min – kaj mi konsciis, ke la doloro malaperis. Mi diris tion al la kuracisto kaj ni kune ridis, ke por ĉesi malsanon sufiĉis pli da akvo en vejnoj.

Mi devis atendi iom da tempo en hospitalo, por ekkoni la rezulton de sangoekzameno. Kia estis mia surprizo, kiam ili trovis nur unu malbonan trovaĵon – altiĝon de kalio elemento. La dimensio de la valoro devas esti de **3,8 ĝis 5,1**. (Malgranda intervalo, ĉu?) Mia valoro estis **5,4!** Mi tuj rememoris, ke hieraŭ mi manĝis pli da fruktoj, krom fragoj en mia kaĉo poste

ankoraŭ unu bananon, kiu rapide maturiĝis kaj estis neniŭ, kiu povus manĝi ĝin. Do tiu banano estis kialo de mia doloro.

Ridinda afero, ĉu? Unu banano okazigis tiom da laboro al ĉiuj medicinistoj. Pardonu min, karaj ...



Kiam la ulino malŝraŭbas vian cerbon

Estis mi malpli ol kvardekjara, kaj sidis mi kun la edzino de mia amiko. Mi estis kvazaŭ rabia lupu, je seksumado, sed mi estis devigata fariĝi ja ŝafido. Ni komencis labori ĉe la sama tablo. Tiam mi eksentis subite ian tremon. Mi provis eviti rektan okulrigardon, ĉar tio kaŭzis al mi elektrizadon. Ŝi parolis kaj ridis, tiel dolĉe. Kvankam, mi simple ties edza amiko ja estis. Mi penis elteni la allogon, ŝin ne rigardante, sed mia korpo dume ekfrostis. La potenca ulinismo de tiu virino igis min sentiĝi tute konfuzita. En miaj vejnoj kvazaŭ eksplodis la sango, Kaj mia cerbo estis komplete blokita. La hormontriloj moviĝis malantaŭen laŭ mi, Kaj la okuloj fulmobrilis, ne demandante la cerbon. Mi povus senpardoninde erari, sinĵetante kvazaŭ lupu la teneran ŝafinon. Eble ŝi konsideris min ne normala homo, Je liberigitaj cerboŝraŭboj, pro la koro. Sed ni, viroj, estas en granda embargo, kiam la ulino malŝraŭbas nian cerbon..


Tradukis Bardhyl Selimi, 4/07/2023, Albanio.

František Drtikol (1883 – 1961)

estis fotografisto, pentristo, viziulo, jogino, tradukisto, budhano, kiu kredis je komunismo. Li estas konata precipe per liaj fotoj de virinoj en stilo „art deco“. Tiu unika viro en sia ateliero akceptadis famajn personojn el politika vivo, el medio de arto, literaturo, muziko, teatro, eĉ el eksterlando. La ateliero donis al li bonan profiton, ĝis venis unua mondmilito. Tamen li kuraĝe plu fotis, desegnis, kreis artaĵojn.

Jen lia eldiro: „Dum mia kreado mi tenas biblian eldiron de la libro Genezis: La Dio kreis homon nudan kaj nuda la homo venas al mondo. Nudeco estas por mi faraĵo dia, dia beleco, dia morala afero.“

En sia testamento li petis esti enterigita nuda.



Pastro František Ferda (1915 – 1991)

estas por iuj sankta homo, por aliaj ĉarlatano.

Li naskiĝis al kvardekjara patrino kaj sesdekkvarjara patro. Lia patro mortis, kiam František estis dekjara. Li ŝatis naturon, muzikon, ludis kelkajn muzikinstrumentojn. Sopiris pri spirita vivo. Li studis en Ĉefepiskopa gimnazio kaj poste en fakultato pri teologio. Ĉe MUDr. Hoffman li lernis medicinajn procedojn kaj irisdiagnostikon. En la jaro 1939 li estis ordinita pastro. Li postenis en regiono *Rokycany* kaj pli poste en *Nechvalice ĉe Sedlčany*.

Li atentigis pri antibiotika rezisto: „Pri aplikado de *Penicilin* oni planis uzon precipe por soldatoj dum la dua mondmilito, por preventi intoksiĝon, aŭ malaltiĝon de febro dum necesa tempo. Pli bone uzi efikan kaj kutiman terapion. Kiam oni trovis, ke antibiotikoj stimulas pliiĝon da pezo de dombestoj, precipe de kortobirdoj kaj porkoj, aperis problemo, ĉar antibiotikoj aperis en viando kaj lakto kaj fine en homoj.“

Li kontraŭis artefaritajn ŝtofojn por vestaĵoj kaj vazaro el aluminio. Li atentigis pri ŝimaĵo sur fruktoj kaj legomo kaj ĥemiaĵoj uzataj en agrikulturo kaj pri danĝeraj elementoj en nutraĵoj.

Post la dua mondmilito okazis en Ĉeĥoslovakio represalioj kontraŭ eklezio. Ferda estis prizonita en la jaro 1951 kaj alternis kelkajn prizonejojn, inter aliaj en *Jáchymov*, fama pro pezaj laboroj por prizonuloj. Post prezidenta amnestio en la jaro 1960 foriris Ferda kun sanaj problemoj de pulmoj el malliberejo, sed ne plu rajtis agi kiel pastro, li laboris kiel laboristo en bierfabriko en Pilseno.


En la jaro 1964 Ferda eksentis siajn eksterordinarajn ecojn – lucidecon. Li mem pri tio rakontis. De sia amiko li ricevis leteron. En ĝi la amiko priskribis siajn sanajn

problemojn kun renoj kaj la pastro meditis, kiel helpi. Li metis manon sur la leterpaperon kaj eksentis kapturton, ŝajnis al li, ke envenas en korpon de la amiko, kiu petas helpon. En tiu momento li subite sciis lian diagnozon. Tuj li skribis leteron al amiko kaj insistis lin viziti kuraciston. En malsanulejo Bulovka lian diagnozon certigis. Kelkfoje li provis saman „enkorpigon“ al neĉeesta paciento. Venadis homoj kaj alportadis fotojn, personajn aĵojn, paperetojn kun nomoj, sed tio eĉ ne estis bezone. Li kapablis diagnozi ekzakte. Jes, tio sonas nekredeble, tial la kapablo de Ferda estis dubinda en okuloj de medicinistoj kaj fakuloj. Ili invitadis lin al diversaj mondaj konferencoj kaj kongresoj, por ke tie li montru sian metodon kaj ili kontrolis lian diagnozon pere de komplikaj testoj. Surprizo por ili: la pastro Ferda povis indiki sangopremon, nombron da eritrocitoj aŭ inflamitan lokon en korpo de paciento.

Ĝis nun neniu malkovris klarvidon de pastro Ferda.

Ĉu povas ekzisti tia donaco al iu homo?

Kompilis JoDo.



Konversacio kun Ajnŝtajno

Timo Flloko, albana aktoro kaj poeto

Kial la homoj senĉese hastas dum la vivo
Kiam ilin atendas la fatala fino?
Ĉu ekzistas formulo, kiu la tempon plilongigus,
Ĝin retroirigus, frostigus kaj haltigus?

La respondo de Ajnŝtajno.

Profesia, Preciza, Kvazaŭ ŝakluda movo,
Al mia ne ĝentila demando, senkonsidere konkludas:

“La moviĝo la tempon plilongigas!”

Mi sin demandas: La scienco limon havas ...ties senco,
forto,

Dum Ajnŝtajno diras: “La imagpovo estas pli sublima ol la scio?!”

Eble, vane, pro la debileco, necerteco en si mem,
Mi klopodas kompreni, kion kaŝas la mistero,
La mortiga koncepto,

De la relativeco: Ĉi tiu fragila vivo, provizora,
Mallonga, kvazaŭ somera pluvo,

Iutage haltas, kiel la folio deŝiriĝas. (por saviĝi, eĉ Dio
niajn preĝojn ne aŭdas ...)

Kial la kruela morto estas eterna, kiam relativa estas ja ĉio absoluta.

Ŝajnas ke Ajnŝtajno, fermis ĉi tie miajn padojn,
Ŝtonigita en la muro, li silentas kaj ne respondas.

Kion li eldiru, lastlaste.

Li ne povas paroli vane.

La vivo, la eterneco, estas ja Dia posedaĵo.

Tradukis Bardhyl Selimi, 15 majo, 2023

Vortoj de PhDr. **VLASTIMIL VONDRUŠKA**, CSc.

°1955 en Kladno, verkisto, historiisto, entreprenisto

Kiam mi legas, aŭ aŭskultas diskutojn pri samtempa socio kaj ĝiaj problemoj, kiuj turmentas nin, mi malgajas. Ne pro la problemoj mem, tiuj estas por nia solvado, sed mi malesperas kiel oni prilaboradas faktojn kaj logikon.

Por vera solvado de problemoj oni devas unue la problemon difini, nomi ĝin precize. Sed **homoj ne konscias, kian gravan funkcion havas ekzakta signifo de vortoj.** Kaj tiuj, kiuj pri tio scias, laboras kun vortoj ofte demagogie, ĉar ili bone scias, kiel facile oni povas la popolan opinion manipuli.



Laŭ Wikipedie, JoDo.

Mi pardonas, sed malmemori ne eblas.
Lernu malvenki, sed ne rezignu!
Mensogon mi malŝatas, sed mi scias, ke la vero
ofte doloras.



Jaruŝ

Vivmotivoj aŭ kial mi faras ĉion ĉi

Kontribuo al konkurso al pola Bialystoko, J. Drahotová, 2023.

Mi naskiĝis antaŭ milito. Tio signifas, ke mi dum mia infaneco kaj frua adolesko travivis mankojn de multaj vivbezonaĵoj kaj nesecaĵoj, kiujn ni ricevadis kontraŭ malgrandaj centimetraj biletoj tonditaj el papera folio.

Dum mia longa vivo mi povis observi, kiel generacioj ŝanĝadis sian karakteron, mi vivis ĉiam inter homoj, ja, mi estis hospitala flegistino. Nun, kiam mi aperis en „dua flanko“ de flegado, mi estas plene matura taksu vivmotivojn kaj evoluon de homa socio.

Unuan fojon mi trovis mian vivmotivon, kiam mi estis dekjara. Mi bone tion memoras. Mi staris sur malgranda tabureto antaŭ spegulo kaj mi parolis al mia vizaĝo. Mi promesis, ke mi servos al ĉiuj, kiuj tion bezonos. Neniu aŭdis tion, nur nun tiu ĉi papero.

Jes, mi plenumis mian infanan deklaron. Konstante mi serĉis en libroj bezonatajn sciojn, por mia profesio. Multe mi traktis kun homoj en tempoj de iliaj problemoj kaj malesperoj. Mi povas doni ateston pri diversaj motivoj de diversaj homoj por plena vivo.

Mi mem kelkfoje transformiĝis – studentino, edzino, patrino, mastrino, ĉefulino, divorculino, esperantistino, vojaĝantino, avino, motoro de grupeto ĉu lernejoj, ĉu studentoj kaj nun emerituloj, akompananto de samaĝuloj, kiuj unu post unu foriras al eterneco.

Bedaŭrinde estas tiaj homoj, kiuj ne trovis vivmotivon, ne spertis humilecon, ne trovis tempon por mediti kaj legi, aprezas supraĵemajn aferojn ... Estas multaj momentoj, kiuj influas motivojn por vivi, tiaj momentoj povas veni eĉ pli

malfrue ... aŭ iu homo povas teni motivon falsan, nebonan ...
Sed vivo sen ia ajn motivo, ia ajn emo estas malgaja, vana.

La vivmotivo estas tre grava, oni devas pri ĝi pensi de infaneco, lerni de tiuj, kiuj havas ĝin. Ĝin oni ne trovos en interreto kiel recepto pri kuko. Parolu pri tio kun gefiloj kaj genepoj.

Trovu konvenan momenton, sed baldaŭ.

TRAGEDIO EN LA UNIVERSO

Ĉu ekzistas io pli tragedia ol la
pereo de la mondo kaj la forekstermo
de la homa gento?

Ekzistas ja.

Ĝi estas tiu korskua primitiveco
de la blindfunkcia mekanismo, kiu
minacas — antaŭ la okuloj de ni
ĉiuj — puŝrenversi la timfebran
homaron en la eternan mallumon
de la Malekzisto.

Tiu ĉi primitiveco ofendas la plej
grandan valoron de la Universo —
la dignosenton kaj mision de la homo
kiel pensipova. estaĵo en la Kosmo.

Leonid Turkadze

PLIBONIGITA LINGVOLERNADO POR PLI JUSTA KAJ PLI EFIKA EŬROPO

Kun granda intereso parolantoj de la internacia lingvo Esperanto sekvis la **Konferencon pri la Estonteco de Eŭropo**. Multaj civitanoj de Eŭropa Unio enmetis ideojn al tio. Kaj multaj el tiuj ĉi pledis por efika kaj agokapabla Eŭropo kaj por plifortigo de la eŭropa identeco. Finfine nepre temas pri valoroj kaj rajtoj, pri la bazo de la formado de demokratia volo kaj pri la konservado de lingva diverseco en EU.

Precipan atenton meritas la ideoj de

- Efika instruado de fremdaj lingvoj per propedeŭtika uzado de facile lernebla lingvo en bazlerneja aĝo kaj
- Agnosko de Esperanto, kiel lingvo kun kulturo kreskinta de pli, ol 130 jaroj, kiu estas jam parolata de civitanoj en ĉiu lando de EU.

Ni ĝojas, ke ankaŭ Esperanto estas menciata en la platforma raporto (**Februaro 2022**) eĉ 22 fojojn pro la multaj kaj multe subtenataj ideoj esprimitaj de la eŭropaj civitanoj pri manieroj, por konservi Eŭropon multlingva kaj tamen interkomunikanta en justa maniero. Tial estas strange, ke tio estas konsiderata en neniu el la 49 proponoj de la fina plenkunsido (en la finrezulta raporto aperas Esperanto nur en aldonaĵo rilate al unu el la naciaj civitanaj paneloj).

Kiel jam aliaj rimarkis, estis problemoj en la transdono de la ideoj de la civitanoj al la postaj diskut-niveleoj, pro kio ni insiste petas, ke en la plenumado de la decidoj oni revenu al tio, kion la civitanoj proponis kaj en nia kampo oni apliku Rekomendon 32 de Eŭropa Civitana Panelo 1 por teni Eŭropon eŭropa kaj multlingva.

Tial ni alvokas EU, kuraĝigi la edukministeriojn de ĉiuj 27 EU-landoj, reprodukti la lernejan programon "**Multilingual Accelerator**" (vidu Proponon 23893) sub profesia pedagogia superrigardo kaj en pli granda skalo, por testi la efikecon de tiu ĉi noviga alproksimiĝo.

EEU.

Blato komuna, kutime en hoteloj



Jana Veselá, Novinky.cz, Ĉeĥio

Mi laboras kiel stevardino en aviadiloj kaj mi vizitis multajn hotelojn. Ekzemple en Kanariaj insuloj, Tel Avivo, Egiptio, ktp. Tie blatoj abundas, spite la hotelo estas vere pura. Elpeli ilin neeble. Mi vidis, kiel katoj sur Kanariaj insuloj blatojn ĉasis rekte sur strato vespere. En hoteloj, kie ni suspektis ilin, ni elektadis ĉambrojn en plisupraj etaĝoj, kie estas la risko trafi ilin pli-mal-ofta. La hoteloj batalas kontraŭ ili, sed centprocento de certeco ne ekzistas.

Por homoj, kiu fobias skarabojn mi konsilon ne scias.

Por homoj, kiu timas mordon de blatoj, mi havas bonan sciigon: Ili ne mordas. Ili estas grandaj, nebelaj, povas trans vi trakuri, sed tio estas ĉio. Kie estas blatoj, ne estas cimoj! Cimoj mordas, povas esti infektaj, do, blato estas malagrabra kunulo, sed utila.

Mi deziras al ĉiuj agrablan libertempon sen skarabaj vizitoj en ĉambroj vespere. Ne mortigu ilin, ĉar ili nur serĉas ion por manĝi kaj pelas cimojn.

JoDo.

Popolaj saĝaĵoj

-Je mono vi feliĉon ne aĉetos, sed pli bele oni ploras en luksa aŭtomobilo, ol urba buso.

-Pardonu al malamiko, sed neniam malmemoru nomon de tiu kanajlo.

-Helpu al homo havanta problemon. Li certe rememoros vin, kiam lin trafos alia problemo.

-Amaso de homoj kviete vivas, ĉar estas kontraŭleĝe mortigi ilin.

-Drinkado problemojn ne solvas, sed akvo ankaŭ ne.

Ĉu la irlanda estos rekonita?

Garbhan MacAoidh korespondanto de Monato en Irlando, la
21an de majo 2022

Miloj da homoj manifestaciis sur la stratoj de Belfasto, la nordirlanda ĉefurbo, por apogi leĝaron, kiu donos oficialan statuson al la irlanda lingvo. Laŭ la konstitucio de Irlando, la irlanda estas la unua oficiala lingvo de la lando (kvankam ne la plej uzata), sed tion ne akceptis la plimulto de la porbritaj unuiĝistoj, posteuloj de la protestantaj koloniintoj de angla kaj sud-okcident-skota origino, kiuj setlis en NordIrlando en la Mezepoko. Ironie, nord-irlandaj protestantoj kaj kvakeroj troviĝis inter la plej fervoraj entuziasmoj de la 19a-jarcenta revigligo de la irlanda lingvo – la tiel nomata **Kelta Reviviĝo**. Oni esperas, ke ĉi-jare la brita parlamento en Londono finfine aprobos leĝon (promesitan en la jaro 2006, sed ne plenumitan), kiu kreas la oficon de komisiito por la irlanda lingvo. Ĝia funkcio estos protekti kaj plibonigi la uzadon de la idiomo.

La leĝo samtempe donos oficialan rekonon al la irlanda lingvo, kaj nuligos leĝojn, kiuj malebligas la uzadon de la irlanda en la kortumoj. La londona registaro intencas fari similan leĝon, kiu rekonos la dialekton de Nord-Irlando, enkondukitan fare de la sud-okcidentaj skotoj dum la koloniado de la regiono.

Einstein diris:

„Mi ne scias, kiujn armilojn oni uzos dum la tria mondmilito, sed mi scias, ke en la kvara mondmilito oni uzos bastonojn kaj ŝtonetojn.”

Magyar törzs Afrikában

La vera historio de la hungara tribo vivanta en la afrika dezerto!

De mia hungara amikino Adri Pasztor mi ricevis tiun ĉi artikolon en la oktobro 2023. Ŝi ĝin ricevis de Lajosnè Czikkely <cziki49@gmail.com>

Ĉu hungara tribo ankoraŭ ekzistas hodiaŭ en la koro de Afriko, meze de la dezerto?! En la unua momento, eĉ la supozo, ke mi povus fari unu el la plej cititaj filmoj de mia vivo (kaj poste la libro kaj prezento) ŝajnis neebla, freneza kaj ŝerco. Sed vere estas tribo en la nordo de Sudano kaj la sudo de Egiptio, kies membroj klare deklaris sin HUNGARAJ jam duonjarmilon; cetere, aliaj ankaŭ vidas ilin kiel hungarojn, fakte: ili estas membroj de la Monda Asocio de Hungaroj de kelka tempo. La afrikaj hungaroj devenas sin de arma komandanto, Ábrahám Magyar, kiu poste konvertiĝis al Islamo, Ibrahim el Magyari, tiel ke ĉiuj hungaraj araboj havas ĉi tiun familian nomon: el Magyari!


Estis iu, kiu kunligis la satelitan elsendon Duna TV al sia domo en la dezerto, kie kelkaj homoj ankaŭ kolektis poŝtkartojn el Budapeŝto kaj Balatono. La stabestro entuziasme subtenis la "hungarajn sportistojn" konkurantajn en hungaraj koloroj, kiuj gajnis orajn medalojn en la Olimpikoj, kaj estas eĉ hungaraj araboj, kiuj ekloĝis en sia patrujo, tio estas en Hungario! Estas komuna opinio, ke la haŭto de la Magyarábós estas pli hela ol la haŭtokoloro de la najbaraj triboj kaj iliaj okuloj estas videble pli mallarĝaj! Grafo László Almásy, afrika esploristo, unue skribis pri la nekredebla historio de la hungaraj araboj pli detale, sed en la

filmo "La angla paciento", kiu poste fariĝis mondfama, kiu pliprofundigis lian aventuran vivon, lian militaktivecon kaj la amrakonto estis elstarigitaj, sed la historio de la hungaraj araboj restis kaŝita sur la kineja ekrano. Tamen mi plej interesiĝis pri ĉi-lasto, do mi komencis esploron kaj organizan laboron. Mi serĉis arkivojn kaj forgesitajn dokumentojn, la bazo de mia laboro estis libro malpermesita pro politikaj kialoj. Kaj la fina rezulto estis unu el la plej edifaj vojaĝoj de mia vivo, kiu kondukis min al la konstato kaj miraklo: jes, VERO, vere estas tribo en Afriko, meze de la dezerto, kies membroj proklamas sin hungaroj dum duonjarmilo! Multo ŝanĝiĝis de kiam mia filmo estis farita, sed unu afero restis konstanta: la hungaraj araboj loĝantaj en la afrika dezerto ankoraŭ nomas sin hungaroj kaj senĉese fieras pri sia hungareco!



Adaptado de romaoj – dornoplena vojo

Oldřich Arnošt Fischer Prelego por la 72-a Kristana Kongreso de KELI en Bjalistoko, la 10-an de aŭgusto 2023



Ciganoj aŭ romaoj? Se mi parolas aŭ skribas pri romaoj, oni min ofte demandas, kial mi uzadas nomon „romao“ anstataŭ la nomo „cigano“. Ja mi ankaŭ antaŭ multe da jaroj parolis nur pri ciganoj. En romaa lingvo

(romanji ĉhib) Rom signifas viro kaj Romnja signifas virino. Kiam en la jaro 1968 en socialisma Ĉeĥoslovakio iomete pliboniĝis politika situacio, en Slovakio romaoj fondis Asocion de Ĉeĥoslovakaj Ciganoj (Zváz ĉsl. Ciganov), poste Asocion de CiganojRomaoj (Zváz Ciganov-Romov) kaj en Moravio kaj Bohemio oni fondis Asocion de Ciganoj-Romaoj (Svaz Cikánů-Romů). Ambaŭ romaaj asocioj sukcese kunlaboris, sed en la jaro 1973 kontraŭreformaj ĉeĥoslovakaj komunistoj ambaŭ asociojn neniigis.

Romaoj neniam plene akceptis la nomon „ciganoj“, kiun al ili donis neromaoj. La 8-an de aprilo 1971 dum la 1-a Romaa Kongreso, kiu okazis en Orpington apud Londono, romaoj akceptis sian oficialan nomon romaoj, romaan himnon kaj romaan flagon, kiu estis proponita jam en la jaro 1933. Pro tio la 8-a de aprilo estas Tago de Romaoj.

Deveno de romaoj Kaŭze de malbonaj kondiĉoj en Hindio romaoj inter la 3-a kaj la 10-a jarcentoj en multaj ondoj migris trans Persio kaj Armenio al Nigra Maro. El Armenio unu malgranda romaa fluo eniris en nuntempan Ruslandon. Ĉefa fluo transiris markolojn Bosporo kaj Dardaneloj kaj trans

Balkano kontinuus en Eŭropon, sed pli malmultenombra fluo iris el Malgranda Azio sudokcidenten kaj trans Proksima Oriento kaj norda Afriko alvenis en Hispanion.

En mia lando, nuntempa Ĉeĥa Respubliko, la unuaj romaoj aperis en fino de la 14-a jarcento. En la 16-a jarcento jam romaoj estis en tuta Eŭropo, inkluzive de Grandbritio kaj Norvegio.

Persekutado de romaoj En Eŭropo oni nomadajn romaojn ne bonvenis, sed toleris. Ĉiu kampo, herbejo aŭ arbaro jam al iu apartenis. Nomadoj el oriento volis adaptiĝi, sed ne ĉiam ili sukcesis. Romaoj estis lertaj forĝistoj, plektis korbojn, konstruis fornojn, fabrikis kaldronojn, ŝlifis tranĉilojn, komercis per ĉevaloj, dresis kaj montris bestojn, precipe simiojn kaj ursojn, estis bonaj muzikistoj kaj dancistoj, sed krom tio ili ŝtelis, trompis kaj mensogis. En ĉeĥa lingvo ĝis nun ekzistas verbo „cigánit“, kiu signifas “mensogi kiel romao”. Endanĝerigitaj nomadoj ofte devis el danĝera loko fuĝi en alian lokon, kie ili estis almenaŭ tempete en sekureco. Ĉiu komunumano, eĉ malgaranda infano, havis sian taskon kaj sciis, kion fari, se la komunumo estas endanĝerita. Se proksimiĝis malamikoj, romaoj rapide pakis sian tendaron kaj senbrue malaperis. En mezepoko oni romaojn torturis kaj ekzekutis (pendumis, dronigis, brulmortigis), en Aŭstrio plej multe dum regadoj de Leopoldo la 1-a Habsburga (1640–1705) kaj Karolo la 6-a Habsburga (1685–1740). Sed en aliaj landoj situacio ankaŭ ne estis pli bona. Ekzemple en la 18-a jarcento en listo de predoj, kiujn ĉasis unu franca duko kaj liaj gastoj, estis krom cervoj, aproj kaj aliaj sovaĝaj bestoj menciitaj ankaŭ „unu pafmortigita ciganino kun ŝia suĉinfano“. Romaoj tion neniam forgesis. Ĝis nun en ĉiuj landoj ili estas en opozicio kontraŭ neromaa majoritato.

Ĉeĥoslovaka Respubliko (1918–1939) sendube estis demokrata ŝtato, sed tie diskriminado de romaoj kontinuas. Por romaoj oni eldonis specialajn „ciganajn identikilojn“, „nomadajn licencojn“, kaj malpermesis al ili eniron en banlokojn, ripozeojn kaj signifajn lokojn. En najbara Germanio kvazaŭsciencistoj Robert Ritter (1901–1951) kaj Eva Justin (1909–1966) el Esplorinstituto por Rasa Higieno kaj Biologa Esplorado de Loĝantaro (Rassenhygienische und Bevölkerungsbiologische Forschungsstelle) subtenis rasismajn leĝojn. Kiam germanaj nazioj okupis restaĵon de Ĉeĥoslovakio (la 15-an de marto 1939) kaj kreis tie Protektoraton Bohemio kaj Moravio (Protektorat Böhmen und Mähren), ili baldaŭ ekpersekutis ne nur hebreojn, sed ankaŭ romaojn. Kun helpo de ĉeĥaj kaj moraviaj faŝistoj ili fondis barakarojn en Lety apud Písek (Bohemio) kaj Hodonín apud Kunštát (Moravio). Post la dua mondmilito Romaoj kaj sintoj (germanaj romaoj), kiuj loĝis en Bohemio kaj Moravio antaŭ la dua mondmilito, estis preskaŭ ekstermitaj. Baldaŭ ilin anstataŭis slovakaj kaj hungaraj romaoj, kiuj en postmilitan Ĉeĥoslovakion alvenis en kelkaj ondoj. La unua ondo alvenis en la jaro 1945. Ĝi konservis siajn romaajn tradiciojn, lingvon kaj bone adaptiĝis. La dua ondo estis en la 50-aj kaj 60-aj jaroj en Slovakio varbita por laboro en Moravio kaj Bohemio. Peza industrio kaj konstruindustrio bezonis laboristojn. Multe da diversaj romaaj grupoj, kiuj perdis sian gepatran (romaan) lingvon, alvenis, malbone adaptiĝis kaj havis oftajn konfliktojn kun neromaoj, kiuj ne toleris “kulturon” de slovakaj romaaj setlejoj.

Se alvenis romaaj viroj sole, ili gajnis monon, iun parton de la mono sendis hejmen, sed ankaŭ multe da mono elspezis por alkoholo, cigaredoj, riskemaj ludoj, ĉar en laboristaj kolektivoj ofte estis nur homoj kun malalta kultura nivelo. (Proverbo: Te gaĝo sikhlijlahas le Romestar leskero laĉho, Rom na sikhlijlahas gaĝestar leskero nalaĉho. / Se neromao

estus kompleza lerni de romao tion, kio en romao estas bona, romao ne lernus tiel kompleze de neromao tion, kio en neromao estas malbona.) La tria ondo alvenis en la 70-aj jaroj, kiam en Slovakio oni neniigis romaajn setlejojn. Slovakaj romaoj estis translokigitaj en blokajn domojn, perdis siajn tradiciojn, kulturojn kaj lingvon. Socialismaj oficistoj neniam respektis romaajn kutimojn kaj tradiciojn. Romaoj estas dividitaj en multaj grupoj, kiuj havas diversajn kutimojn, kulturajn nivelojn kaj dialektojn. Sed oficistoj decidis, ke ĉiuj romaoj devas loĝi kune. Tial ekzemple romaoj de alta kategorio (ĵuĝe-romaoj) havis kiel la plej proksimajn najbarojn romaojn de la plej malalta kategorio (degeŝ-romaojn), kun kiuj ili ne komunikas.

Socialisma reĝimo donis al romaoj loĝejojn (ofte prioritare), sed oficistoj ne sciis pensmanierojn de eksaj nomadoj. Ekzemple neromaoj ofte klopodas perturbiĝitajn aĵojn aŭ ripari aŭ riparigi – romaoj tion ne faras, ili perturbiĝitajn aĵojn forĵetas kaj volas la novajn. Sincere dirite: ĉu tiu konduto ne similas al konduto de nuntempa konzuma socio? Se romaoj ricevis novan loĝejon, ili ĝin rapide eluzis – kaj volis novan. Romaoj ofte neglektas malordon ĉirkaŭ siaj domoj. Ili ŝatas loĝi en grandaj komunumoj, faras bruon. Tial neromaoj lokojn, kie loĝis romaoj, baldaŭ forlasis. En socialisma Ĉeĥoslovakio ekestis la unuaj romaaj getoj. Eĉ en la jaro 2023 en Ĉeĥa Respubliko loĝas 80 miloj – 100 miloj da romaoj, preskaŭ duono da romaoj, en getoj. Socialisma reĝimo superestimis permanan laboron, kiun bone pagis. Sed post la jaro 1989 tio finis kaj romaoj estis la unuaj, kiuj perdis laboron.

Kiam Ĉeĥoslovakio estis dividita inter Ĉeĥa kaj Slovaka Respublikoj (la 1-an de januaro 1993), slovakaj romaoj fariĝis eksterlandanoj kaj devis peti civitanecon de Ĉeĥa Respubliko. En ĈR romaoj estas la plej multenombra malplimulto (ĉirkaŭ

250 000 personoj). Ĉirkaŭ unu duono loĝas en getoj. Tri kvaronoj de romaoj apartenas al slovakaj romaoj, malplena unu kvarono estas hungaraj romaoj, ĉirkaŭ 30 000 estas olaĥaj romaoj (kiuj en la dua duono de la 19-a jarcento alvenis el hungara Valaĥio) kaj kelkaj familioj apartenas al sintoj. Tiuj grupoj nek komunikas nek kunlaboras. Memkonscio de romaoj ofte estas malalta. En la jaro 2011 dum censo nur 13 150 loĝantoj de ĈR konfesis romaan naciecon. 47 % da romaoj en produktiva aĝo dependas nur de ŝtataj financaj kontribuoj. Ili scias ruze misuzi kontribuan sistemon. Ekzemple, se naskiĝis romaa infano, ĝia patrino diris, ke patro de infano estas avo de infano. Tio estas protokolita. Kial? La avo baldaŭ mortos kaj romaa infano havas duonorfan ŝtatan financan kontribuon. Romaoj ofte estas ruzaj, sed ne estas spertaj en financaj aferoj, tial ili fariĝas predoj de uzuristoj kaj trompisto.

Oficistoj konsilis al gepatroj paroli kun romaaj infanoj ĉeĥe. Sed la gepatroj parolis ĉeĥe tre malbone. Tial iliaj infanoj bone sciis nek romaan nek ĉeĥan lingvojn. Al romaa lingvo ĝis nun mankas faka terminologio. Infanĝardenoj ne ricevas ŝtatajn dotaciojn, tial romaaj infanoj ilin ne uzas. Aktivuloj nun batalas por dotacioj al lastaj klasoj de la infanĝardenoj, por ke romaaj infanoj vizitu la infanĝardenoj antaŭ eniro en bazaj lernejoj. 86 % da romaoj havas nur bazan aŭ nefinitan bazan klerigon. 30 % da romaoj estas analfabetaj (2009). En multenombraj romaaj familioj lernantoj ne havas trankvilan lokon por studado. Sed ankaŭ iliaj gepatroj kaj geavoj ne havas bonan rilaton al lerneja klerigo. Ili volas, por ke infanoj kaj nepoj baldaŭ ie eklaboru kaj ekgajnu salajron por romaa komunumo.

Romaoj ofte pensas nur pri aktuala situacio kaj ne pri futuro. Nur 12 % da romaoj havas metiistajn atestojn. En laborlokoj ili ofte ne restas longtempe. Sanstato de romaoj

estas pli malbona ol sanstato de neromaoj. 25 % da neromaoj ĝisvivas emeritan aĝon, ĉe romaoj nur 6 %. Romaoj estas sesfoje pli multe malsanaj ol neromaoj.

Religio. En Ĉeĥa Respubliko pli ol 80 % da loĝantoj estas ateistoj. Kredantoj estas plimulte romaaj katolikoj. Romaoj ne uzadis skribon, sed edukitaj romaoj skribas uzante ĉeĥan alfabeton. El Sankta Biblio voluntuloj romaigis Novan Testamenton. Romaoj, kiuj estas kredantoj, ofte miksas kristanisman kun siaj religiaj ideoj. Ili ofte estas superstiĉaj, kredas pri postmorta vivo, revenantoj kaj mulooj (fantomoj de mortintoj), kiuj povas fari domaĝojn al vivantaj homoj. Al romaaj kutimoj apartenas gardado apud mortinto antaŭ entombigado kaj dediĉo de transtombaj donacoj al mortintoj (viroj en ĉerkoj ofte ricevas botelojn da prunbrando sub siajn kapojn kaj monon en siajn poŝojn). Kaŭze de pompaj entombigoj romaoj povas ŝarĝi sin per ŝuldoj.

En la jaro 2011 apud Frýdlant (norda Bohemio) Moravia Kunfrataro, kiu ekde la jaro 2005 kunlaboras kun romaoj, fondis romaan kolezion Nevo Ĝivipen (Nova Vivo).

Atakoj kontraŭ romaoj. En la 90-aj jaroj romaoj suferis de provokoj de razkapuloj (novnazioj). La 19-an de aprilo 2009 en Vítkov kvar razkapuloj (Václav Cojocar, Ivo Müller, David Vaculík kaj Jaromír Lukeš) nokte atakis per molotov-boteloj domon, en kiu dormis romaa familio Sivák. Tri homoj estis vunditaj. Knabino Natalia (eĉ ne du-jara) estis vundita sur 80 % da korpa surfaco kaj perdis tri fingrojn. Ŝi estis multfoje operaciita.

2023:

Konfliktoj inter romaoj kaj ukrainoj. En tiu ĉi jaro (2023) aperis konfliktoj inter romaoj kaj ukrainaj rifuĝintoj. La 10-an de junio 2023 en Brno en tramo veturis grupo de junaj romaoj. Laŭ rakonto de unu atestanto romaoj faris bruon, molestis kunvojaĝantojn per laŭta muziko, poste ili eĉ en la tramo

ekfumis. Tio ne plaĉis al 37-jara ukraino, kiu la romaojn admonis. Romaoj bone ne komprenis ukrainan lingvon, sed konflikto komenciĝis. En celo de vojaĝo romaaj viroj diris al virinoj, por ke ili iru antaŭen. Tri romaoj ekbatis unu ukrainon kaj faligis lin sur teron. En tiu situacio la ukraino uzis tranĉilon. Rezulto: unu morta 22-jara romao, alia romao estis vundita, ukraino estas en malliberejo. Protestoj, manifestacioj kaj manbatoj inter romaoj kaj ukrainoj sekvis. Krom tio romaoj ne ŝatas ukrainojn, ĉar konsideras ilin konkurantoj. Ukrainoj povas esti universitatoj, sed se ili ne scias ĉeĥan lingvon, ili laboras nur permane, same kiel multaj romaoj.

Antaŭ milito en Ukrainio nia ŝtato helpis precipe al romaoj, nun ĝi helpas ankaŭ al ukrainoj.

Helpo al romaoj. Fama romaa aktivulo David Tišer dum la Unua Romaa Konferenco, kiu la 26-an de majo 2023 okazis en Brno, diris, ke romaoj bezonas fortan mezan klason kaj edukitajn ekspertojn. Ekde la jaro 2001 al romaoj helpas programo Homoj en Nia Socio (Ĉeĥa Respubliko, Bulgario, Rumanio, Slovakio). En bohemia urbo Kolín funkcias Romaa Sociala Mezlernejo (Romská střední škola sociální). En lokaj urbodomoj laboras ĉirkaŭ 50 socialaj asistantoj. En regionoj helpas ĉirkaŭ 80 romaaj konsilantoj. En lernejoj helpas pedagogaj konsilantoj (pli ol 300). Cento da memvolaj helpantoj laboras inter romaoj en stratoj. Dudek policanoj estas romaoj. En ĈR funkcias 200 neregistaraj senprofitaj organizoj.

Eduka programo Gendalos (Spegulo). La programon fondis kompanio IQ Roma servis, kiu ekde la jaro 1997 kunlaboras kun romaaj studentoj, iliaj gepatroj kaj instruistoj. Ĉiujare ĝi helpas al ĉirkaŭ 70 infanoj. Ĝi kontaktas lernantojn de la 8-a kaj la 9-a klasoj de baza lernejo. Ĝi al studentoj ofertas stipendion, por ke la infanoj ekstudu en mezlernejo kaj sukcese finu studadon.

Antaŭ romaoj ankoraŭ estas dornoplena vojo, sed ili havas ŝancon trovi sian lokon inter nacioj de tuta mondo.



**Sekreto ? Sekreto de najbaroj ?? Sekreto de niaj najbaroj
??? Devas esti malkovrota !!!!**

J. Drahotová, 2023 por „Bobelarto“

Mi loĝis en domo haste konstruita en postmilitaj jaroj por laboristoj de aŭtomobila fabriko. Kontraŭ nia pordo en koridoro loĝis familio Ŝarkezi kaj supre de nia plafono loĝis familio Olah. Ambaŭ familioj havis petolemajn brunajn infanojn. Ĉar ciganoj estas laŭtemaj, ni multe sciis pri iliaj problemoj, humoro, kvereloj, je kioma horo ili vekiĝas, kiam venas gastoj por festeno ...De tempo al tempo venis al ni ciganino prunti iom por kuiru aŭ negrandan sumon da mono. Ne estis problemoj, ĉar ni kaj ili estis samrajtaj kaj SAMDEVAJ en socialisma tempo kaj kiam ni bezonis ion helpi, ni petis ilin.

Mi eksciis el literaturo, ke tiel ne estis ĉiam. Ke ciganoj venis el Hindujo, neklare onidire kun kristanismo kiel ĝia „kultura arta propagando“, ĉar ili bele kantis, dancis, teatraĵis, sed ni terkulturis kaj havis plurajn diojn. Tamen neniu memoras tion kaj nur diablo scias, kiel ĉio okazis. Ciganoj, kiujn mi konas, naskiĝis ĉe ni en nia lando, do estas „niaj“ dum regis socialismo. Fakte ni nomis ilin „ciganoj“ ili nomis sin „ciganoj“ kaj ilia elparola koloro sonis alie ol la nia, sed ilia la ĉeĥa estis pura, ĉar ĉiuj vizitis lernejon kaj ĉiuj laboris, ĉar devo plenumi leĝojn estis tiam por ĉiuj.

Mi laboris kiel ĉefflegistino en hospitalo kaj en mia teamo laboris ciganinoj kiel helpantinoj por ordigo kaj nutrado de malsanuloj. Mia edzeco post 10 jaroj estis seninfana. Ni adoptis trijaran knabeton el orfejo laŭ principo de soveta psikologo Makarenko: „Infano estas malplena tabulo, kion oni skribos sur ĝi, tia homo li fariĝos“. Ni klopodis eduki nian helbrunan filon laŭ kutimoj de „blankaj“. Ĉio pasis normale, ni estis feliĉa familio ĝis la frua maturiĝo de la knabo. Baldaŭ lin trovis liaj etnanoj kaj mi gvidis baldaŭ la filon al oficejo por edziĝo kun bela graveda ciganino. Dum nupta festeno en hejmo de la fianĉino mi ekvidis, kiom da multaj parencoj mi akiris. Oni drinkis, kantis, dancis, manĝis. Surprizis min, ke virinoj nur trinketis (krom du fraŭlinoj) el malgrandaj glasetoj vinon kaj ne ebriĝis. La ciganestro rakontis al mi pri planoj de estonto de la etno. Nur poste mi eksciis, ke ni ne plenumis kutimon alporti pli grandan monsumon, ol ni ĉe eniro en la nova hejmo de nia filo donis. Ja, ni novan familion riĉe ekipis per meblo, vazaro kaj ĉio, kion hejmo bezonas. Ĉio ŝajne plu pasis ordinare. Nepino estis ĉarma, bofilino lernis kuiru, nia familia nesto orfiĝis, juna paro de tempo al tempo vizitis nin, ĝis venis tago, kiam venis bopatrino kun bofilino al mia laborejo kun laŭta ploro: „Via filo estas arestita! Ni volas divorci de li!“

La filon mi vidis ĉe tribunalo, kiam li venis kun katenitaj manoj, en kiuj li portis metalan kuglon, liaj piedoj estis ligitaj per ĉeno.

Pasis kvin jaroj. La filo revenis. La sociala servo trovis por li gravedan virinon kun tri knabetoj, esperante lian vicigon en socion.. La kvaropo staris ĉe mia pordo kaj petis helpon. Mi klopodis enorme. Mi pruntis monon kaj aĉetis dometon kun stalo en iomete malproksima vilaĝo. Naskiĝis ĉarma bruna knabineto. Kvina ido venis baldaŭ. Mi vizitadis novan familion ofte, provizis ĝin laŭ miaj fortoj. Tempo pasadis. Infanoj kreskis. Ilia patrino sukcese mensogis al mi pri problemoj, pri ŝuldoj, pri ŝtelado, pri nova prizonado de mia filo. Kiam dometo ruiniĝis, kaj mi jam ne kapablis repagi ŝuldojn kaj la dometo restis sen elektro, kun disrompitaj fenestroj, sen necesejo, mi perdis forton, malesperiĝis. Oficoj la dometon pro ŝuldoj konfiskis. Feliĉe infanoj jam finis lerneajn jarojn kaj la familion forlasis. Gepatroj restis „sur la strato“.

Al mi restis pensoj pri sekreto de la etno, kiu kapablas gaji senzorge, fiere, sen respondeco havante iun „malamon“ ĉu „rasismon“ ĉu maldankon al ni gaĝoj, kiel ili nomas nin „blankulojn“.

Sed aperis surprizo. Tri genepoj el kvin kreis propran familion kaj estimas min. Laboras, havas propran loĝadon, kaj po du infanoj. Siajn gepatrojn ili ne akceptas.

Nu, la sekreton de apudloĝantoj oni neniam povos malkovri plene. Tion mi spertis.



„Sekreta vivo de niaj najbaroj ” estas tre interesa kaj vasta temo.

Blanka Hužerová, septembro 2023
por konkurso Bobelarto

En nia industria urbo en Ĉeĥio vivas inter ni multaj homoj el fremdaj landoj, kiuj laboras en aŭtomobila fabriko ŠKODA kaj ili en libera tempo tenas ankaŭ kutimojn de siaj landoj laŭ tradicioj de siaj gepatroj, Ili toleras niajn kutimojn, Ili vivas longe ĉi tie, dum jaroj. Kaj tio estas bona.

Vivon de bestoj aŭ insektoj ni povas kompari kun vivo de homoj.

Bestoj kaj insektoj ja vivas sian vivon de niaj najbaroj, Ili estas niaj najbaroj. Ili estasj agrablaj aŭ malagrablaj .

Ĉu vi konas dramon de elstara ĉeĥa verkisto Karel Čapek „El Vivo de Insektoj“ fascina teatraĵo, tradukita al Esperanto? Aŭ ĉu vi scias la proverbon „Diligenta kiel abelo“? Rememoru formikejon. Ĉio tie havas siajn regulojn, ĉiu formiko konas sian taskon, Mi kiel infano legis libron „Ferda Mravenec“ (Forniko Ferda) de J. V. Pleva. La libro min multe lernigis.

Kaj nun en mia matura emerita aĝo mi partoprenis prelegon "Kio gvidas nin al feliĉo". La ĉefpreleganto komparis homojn al formikoj en formikejo. Kiel ekzemplo li uzis rakonton de pastro el urbo Písek „Kiel oni vekas formikojn“.

"Iam mi aŭdis rakonton pri vekiĝo de formikoj, Ĉiuj formikoj iris dormi antaŭ vintro sub teron. La formikejon vintre kovris neĝo kaj formikoj dormis. En printempo kiam komencis brili suneto kaj radioj varmiĝis formikejon, suna radio de varmo trovis unu formikon. Li vekiĝis post la vintro. Li dormete elrampis sur pinton de formikejo. Tie li staris kontraŭ suneto kaj ĝuis varmon. Post varmiĝo, li forkuris suben kaj brakumis formikon, kiu dormis apud li. Kaj poste ili

kuris supren, denove staris kontraŭ suneto, varmiĝis kaj kuris suben vekigi aliajn formikojn...2, 4, 8, 16, 32, ĝis ĉiuj kuradis supren por varmiĝi per radioj de suneto. Tiel vekigis la tuta formikejo.

La pastro komparas la aferon al Dia amo. Ni staras kontraŭ amo de Dio. Ni varmiĝos per la Dia amo, niaj konoj ŝanĝos el malbonaj al bonaj. Ni bezonas iri supren kaj helpi al homoj kun malbonaj sentoj. Kiuj bezonas brakumi kaj stariĝi kontraŭ suneto.

Kaj ni ĝojos, ke ni helpis al aliaj homoj...kiel tiuj formikoj.

Ĉu tio estas vera sekreto de niaj najbaroj (bestoj kaj insektoj) ? Ni devus de ili lerni.



Lasius niger

© Josef Dvořák

Kiu ne scias pardonpeti, detruas ponton, kiun li por trairi riveron bezonas, ĉar ĉiu homo la pardonpeton bezonas.

Pri sukero, katoj kaj mondo de plej diversaj noveloj

Anna Striganova, Novembro
2023. (Bobelarto)

Mi ricevis inviton iĝi unu el la ĵurianoj de la INK-konkurso antaŭ la UK en Montrealo. Tiu, kiu poste ne okazis, sed estis prokrastita. Tiam INK ankoraŭ naskiĝadis, eĉ temo ne estis anoncita. Unue mi ekmeditis: mi neniam estis

ĵuriano de iaj konkursoj, ĉu mi sukcesos esti justa, ĉu mi estas sufiĉe sperta por tiu estimata rolo kun tia belsona nomo – ĵuriano de literatura konkurso! Nu... certe mi konsentis, tuj!

Poste venis Kovim kaj iĝis interalie temo de la unua INK-konkurso. Mi ektimis: Kovimo kun sia timiga kaj morna enfermiĝo regis la mondon, kaj nun mi devos renkonti ĝin ankaŭ en literatura formo, en dekoj da rakontoj, certe mornaj kaj senesperaj. Sed, ricevinte la kajeron kun konkursantaj noveloj, mi tuj komprenis, ke mi eraris. La rakontaro ne igis la ombrojn kolektiĝi ĉirkaŭ mi, sed helpadis al mi ilin forpeli. Ne timo kaj ne malsano okupis la ĉefan lokon en la rakontoj, sed miloj da manieroj ilin travivi, ilin superi kaj resti homo. Jen la sekreta kuirrecepto de saŭco de ja verŝajne ĉiu el ni voĉdonos pri io persone proksima: ĉu pri fantazia rakonto, aŭ pri detektiva, aŭ pri rakonto verkita kvazaŭ de hejma kato... Sed tute ne atendite ni ĉiuj voĉdonis sufiĉe simile. Kaj ricevinte la rezultojn mi sentis varman kunsenton kun la aliaj ĵurianoj, parte eĉ ne konataj por mi. La kvinopo de verkintoj estis brila, kiel mi ĝuis! Sekvantjare aperis du novaj defioj. Unue, la kvanto da rakontoj lavange ekkreskis. Due, aperis noveloj,



tradukitaj en Esperanton. Sed la vojo estis jam konata kaj la temo tiel enigme agrabla – “nokta vojaĝo”! Ĉi-foje estis pli da profesie verkitaj noveloj, do elekto vastis. Mi kun plezuro rimarkis, ke sufiĉe grandan kvanton da rakontoj mi legas kun la sento, ke inter miaj okuloj estas ne konkursantaj noveloj, sed freŝaj, originalaj klasikaĵoj. Estis ankaŭ konataj vizaĝoj, eĉ ne vizaĝoj, sed muzeletoj, novaj rakontoj verkitaj kvazaŭ de hejmaj katoj! Sendepende de la temo, kataj rakontoj nekredeble multas, indus eldoni apartan libreton INK, okupita de katoj, ron-ron.

Mi bone memoras, kiel vintre mi kun infaneca dolĉa senpacienco atendis du aferojn: la Novjareforpasinta avo helpas reamikiĝi al la familio kaj eĉ denove eklerni aŭdi la voĉon de malnova domo. Jen knabino kun bonega humursento trovas sian amon per Amikumu kaj, vi ne kredos, ilia renkontiĝo ne eblus sen kvarantena enfermiĝo! Kaj jen postkovima estonteco, kie por eviti novajn virusojn oni malpermesas al homoj brakumi unu la alian kaj ankaŭ manĝi sukeron! Mi neniam ŝatis sukeron, sed post tralego mi ĉiam metas ĝin sur videblan lokon en mia hejmo, kiel simbolon :) Ho, per la tuta mia animo mi deziris, ke tiu rakonto pri brakumoj aperu inter la venkantoj. Kaj ĝi ja aperis! Do, INK tuj iĝis grava parto de mia vivo. Estis ege interese diveni, de kiu lando estas la aŭtoro, kiom aĝa, kaj eble eĉ la aŭtoro estas iu mia konato? Pri la landoj, interalie, mi ofte trafis. Pri ĉio alia, ve, neniam! Estis interese por mi, kiel la aŭtoroj, eĉ perfekte verkantaj en Esperanto, per io apenaŭ sentebla malkovras sian devenon aŭ sian gepatran lingvon! Mi ankaŭ maltrankvilis, ĉu entute eblos elekti gajnantojn en tia bunteco, 231 Esperanto 1384(11) Novembro 2023 Kristnaskajn festojn kaj la rezultojn de nia INK-voĉdonado. Kaj kiam mi ekvidis sur la ekrano de mia komputilo, kun aro da aliaj mesaĝoj, mesaĝon de Stela kun la rezultoj, ĝi ŝajnis al mi kovrita per

kolora papero kaj ĉirkaŭligita per ruĝa rubando! Kaj similaspekte venis al mi invito trian fojon iĝi INK-ĵuriano. Ek al novaj aventuroj, ĉi-foje renkonte al enigmaj najbaroj kaj novaj katoj certe!

P.S. Antaŭ kelkaj tagoj, venkinte obstinajn barojn de novaj poŝtaj reguloj, min finfine atingis la presitaj versioj de ambaŭ novelaroj, kiujn mi plezure montros al miaj Esperanto-lernantoj!

El „ESPERANTO“, Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko) Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). Novembro 2023. (Bobelarto)

Nokta aventuro

— Vi vane fanfaronas, — la Diablo diris al mi. — Mi montros al vi mondojn, kiujn vi ne povus imagi. Rigardu: ĉu vi vidas la stelon α en la konstelacio Oriono?

Mi rigardis laŭ la indiko de lia longa skvama krifo. Per la alia brako la Diablo levis la pezan kurtenon de l' fenestro. La ĉielo ŝajnis nigra abismo, faŭkanta antaŭ la piedoj.

— Ĉirkaŭ tiu stelo, — la Diablo daŭrigis, — rivotuas cent kvardek grandaj planedoj, sen konsideri asteroidojn. Mi kaj vi tuj venos al unu el ili; ĝi grandas kiel via verda Tero.

— Sed kiom da tempo ni vojaĝos? — mi rikane demandis.

La Diablo rigardis min kun duoble pli intensa rikano. Lia maldensa barbo skuiĝis, kaj li respondis al mi jene: — Ni certeflugadus dum milionoj da jaroj, se ni intencus iri tra ĉiuj punktoj inter la Tero kaj tiu astro. Sed ni ignoros ilin. Donu al mi vian manon. Tiutage la Diablo surhavis vastan hispanan mantelon, kaj lia vizaĝo similigis lin al la opera Don Johano, sed — pro stranga dandemo — li konservis la vilajn polmojn kaj hokecajn fingrojn, kiel la demono de l' Mallumo sur la gravuro de Dürer. Naŭza spasma atakis min pro la tuŝo de lia aspra mano. Sed la Diablo rikanis rekte en mian vizaĝon kaj impete tiris min antaŭen, kvazaŭ engaĝante min en iun frenezan dancon. Mi spertis efemeran vertiĝon, ĉar mia kunvojaĝanto odoris parfumon fortan, sed malagrablan. Tamen la Diablo tuj liberigis mian manon. Ni jam estis ekster la Tero. En mondo, kiun mi ne konis. La ĉielo super ni estis iriza. Ĝi ĉiuminute estis kvazaŭ brilanta pro purpuraj fulmoj, kies koloro poste rebrilis per ĉiuj koloroj de l' spektro. La tuta universo ŝajnis aspekti kiel giganta artfajraĵo aŭ totala incendio.

— Ne timu, — la Diablo diris al mi, ridegante, — ne timu, almenaŭ ĉar vi malhavas viajn korpajn organojn. Tiel okazis ne pro tio, ke por mi estus komplike porti ĉi tien vian surteran konsiston, tion fari por mi estus tiel facile, kiel forpuŝi vin trans pordon. Sed viaj korpaj organoj ne estas adaptitaj por ĉi-tieaj atmosfero kaj lumo. Tial mi preferis kunpreni vin en la aspekto astrala. Sed via korpo kuŝas, kvazaŭ kadavro, sur la planko en via ĉambro, de kiu nin disigas tiom da mejloj, kiom vi ne povas imagi.

Mi rigardis ĉirkaŭe. Sur la grundo ĉirkaŭ ni kreskis plantoj. Tamen ili movetiĝis. Ili estis oranĝkoloraj tigoj — algrundigitaj per radikoj — hombrake dikaj, kun stretaj kaj apenaŭ burĝonantaj skvamoj, kvazaŭ siaspecaj folioj. Sed super la tigoj estis, kvazaŭ florkalikoj, grandaj rondaj ĉapoj.

La kalikon kronis petaloj, inter kiuj, anstataŭ supozeblaj stamenoj, similaĵo de okulo malbrile reflektis lumradiojn. Maro da tiuj oranĝkoloraj, altaj, okulhavaj tigoj lante serpentumis, etendiĝis flanken, ekŝvebis kaj resinkis, kvazaŭ movate de vento, kiun mi ne povis percepti.

— Ili ne vidas nin, — la Diablo diris al mi, — ni iru. Ni eksagis en facila aerflugo. La aspekto de mia kunvojaĝanto ŝanĝiĝis. Nun li similis vizion pri la belega Lucifero, kaj krono el nehelaj diamantoj lumetis super lia vizaĝo — la vizaĝo de defalinta serafo. La vivantaj plantoj kun tremo rektiĝis sub ni, malklare perceptante la ventumon de niaj astralaj korpoj. Jam vesperiĝis, kaj la skarлата sundisko ekkuŝis sur la horizonto, pikante blindigajn irizajn radiojn en la lante paliĝantan firmamenton. Poste la fajra rondo sinkis ekster la vidatingon, kaj en la ĉielo komenciĝis nova danco de ĉiaj koloroj kaj nuancoj — ebria ludo de flamantaj, buntaj, ŝanĝiĝantaj kameleonoj kaj salamandroj. Post nelonge aperis kvar lunoj: blua, verda, flava kaj viola; iliaj kruciĝantaj radioj etendis fluojn da kvieta lumo tra la ankoraŭ flagrantaj rebriloj de l' tago. Rimarkinte, ke mian atenton kaptis la ĉielaj bildoj, la Diablo aplombe diris al mi: — Tamen vi estas tre mirigita.. Sed rigardu suben: tie komenciĝis la tempo de amo. Mi ŝajnis min ne rimarki la misciton el “La Paradizo” kaj efektive mallevis la rigardon. Kaptitaj de pasia sopiro, la vivantaj tigoj nun interproksimiĝis, grupiĝante po tri. Sub la magia lumo de la kvar diverskoloraj lunoj iliaj okuloj ekvivis kaj ekscintilis per volupta flamo. Mi vidis, ke la plantoj, ŝnure interplektante siajn tigojn kaj altigante sin supren kiel lancoj, kunigis siajn 27 florkalikojn, kvazaŭ serpentoj la kapojn sur la bastono de Hermeso. Mi vidis poste, kiel la tri kalikoj kuntuŝiĝis, kiel iliajn okulojn tegis malklara likvaĵo, kiel iliaj petaloj kuniĝis en unu hida butono. Ni plu glitis en facila flugo

super la hirtiĝinta grundo, kaj mi demandis mian kunvojaĝanton: — Kial ili kopulacias trio? —

La Diablo respondis malestime: — Vi, kiel homo, opinias, ke nur du seksoj povas ekzisti. En tiu ĉi mondo ekzistas tri seksoj, sed mi konas mondon kun dek sep, kaj estas mondoj kun kelkaj miloj. Tamen mi ne venigos vin al tiuj landoj por ne doni neplenumeblan taskon al via febla terana menso. Intertempe la kuniĝintaj tigoj rektiĝis sub ni kiel ferstangoj kaj ekcelis siajn pintojn rekte al la ĉielo. Iliaj skvamaj folioj glupremiĝis al la tigoj, kaj inter la tigoj, ĉe la radikoj, vidiĝis grundo — sulkoza kaj seka kiel haŭto de senila hipopotamo.

Mi denove metis demandon: — Ĉu akvo mankas sur tiu ĉi planedo? La Diablo malzorge ĵetis respondon: — Hidrogeno estas ĉi tie.

Mi ne plu deziris demandi, kaj ni plu flugis silente ĉirkaŭ la planeda globo, kiu estis ebena kiel kokovo kaj senluziige monotona — sen montoj kaj valoj, sen riveroj kaj maroj. Dum kelka tempo mi denove admiris la bildon de l' stelplena nokto, atente rigardante la dispozicion de la steloj, blankmakule trapikantaj la bluan-verdan-flavan-oranĝan ĉielon; tiu dispozicio estis alia ol la vidata sur la Tero. Poste mi denove rigardis la plantojn kaj vidis, ke iliaj amorspasmoj ĉesis. La langvoriĝintaj tigoj rapide malimplikiĝis kaj unu post alia falis grunden, senfortaj kaj debilaj. Baldaŭ la grundon sub ni denove kovris hida amaso da torporaj, supraj plantoj, kun malbele misformitaj florkalikoj, de kiuj sence kaj malsprite gapis nevidanta, senmova rigardo. Treme mi diris al la Diablo: — Aŭskultu, mi enuas ĉi tie. Vi promesis montri al mi mondon, kiun mi ne povas imagi. Mi certigas vin, ke la fantazio de Flammarion kaj Wells bildigis multe pli mirindajn mondojn. Mi pensis, ke vi venigos min en la regnojn de spiritoj de lumo kaj fajro, kies sentoj kaj nocioj estas

milionoble pli komplikaj kaj pli delikataj ol la miaj. Mi pensis, ke vi venigos min en alidimensiajn universojn, kie io nova estas aldonita al la mezuro de ĉiuj objektoj, aŭ en universojn de alia tempo, kie krom la paseo, nuno kaj futuro estas io kvara. Sed vi, en la tuta senfina mondo, elektis por demonstri al mi nenion pli bonan ol artfajraĵon, kiun eblas ekzakte reprodukti per kinematografio, kaj misvolupton de l' floroj — tiu spektaklo naŭzas min. Sciu, ke via pliagha frato Mefisto estis multe pli inventema.

La tuta konsisto de la Diablo terure ekflamis, kaj li kolervoĉe hurlis al mi el la fundo de sia estaĵo: — Mizera vermo! ĉu vi forgesis, kiel Faŭsto falis vizaĝ-al-planke, kiam aperis la Terspirito, aŭ kiel Semela estis cindrigita ekvidinte Zeŭson? Ĉu ankaŭ vi deziras tion?

Sed mi etendis miajn astralajn brakojn polmosupre kaj kviete prononcis la magian formulon de l' glora Cipriano; la vizaĝo de Lucifero tuj kurbiĝis kaj misformiĝis, kvazaŭ en konvekso spegulo, kaj mia kunvojaĝanto, pli rapide ol fluganta bolido, falis en fajran abismon. Samtempe mia estaĵo ricevis baton, teruran kiel sparko de mil elektraĵoj, kaj mi ekvidis min sidanta sur la planko, en mia ĉambro, apud la skribotablo. Nenio ŝanĝiĝis interne, sed levita estis la kurteno antaŭ la fenestro, kaj unu el la fenestraj vitroj estis frakasita: certe pro la tremo ĉe mia falo, ĉar la astrala korpo, trairante solidajn objektojn, ne ŝanĝas ties fizikan staton.



Tradukis Aleksander Korĵenkov

Jen eta raporto pri la 108-a UK en Torino

Edmond LUDWIG

Kun mia edzino mi denove havis la okazon partopreni en UK post la pandemio. Ni komencis nian viziton per la Movada Forumo en la korto de la universitato « *Politecnico de Torino* ». Kvardeko da asocioj prezentis sian agadon kaj esperis membriĝojn. Dimanĉe matene okazis la inaŭguro de la kongreso en SALONO ZAMENHOF, kiu distancis je nur 8 minutoj piede de la kongresejo. Cetere: pluraj komfortaj hoteloj ankaŭ najbaris la kongresejon. Krome: jam eblis antaŭkongrese aĉeti rete tutsemajnan bileton por ĉiuj transportrimedoj en la urbo. Kion diri pri la kongreso mem? Por kutimaj kongres-partoprenantoj ĝi estis rutina kongreso kun la ebleco ĉeesti multege da prelegoj sciencaj kaj kulturaj, diskutoj, koncertoj ktp. Se mi devus detaligi, tiu raporto estus longega! Mi insistu pri la jeno: de estrarano de UEA mi eksciis, ke ne multnombris la membroj de la organiza skipo en Torino. Despli laŭdinda estas la tre kontentiga disvolviĝo de tiu kongreso, kiu arigis en Torino pli ol 1300 kongresanojn el 69 landoj. Laŭdoj ankaŭ iru al la slovakia e@i kaj UEA! Ni reliefiĝu, ke la prezidanto de UEA ĉeestis multnombrajn prelegojn kaj kunvenojn, rikoltante notojn dum la tuta aranĝo sur sia komputilo. Mi ne detale raportos pri la tre diversaj koncertoj dum la sukcesa nacia vespero, dum la kongreso mem laŭlonge de la semajno aŭ vespere. Feliĉe nun multnombras la

artistoj esperantlingvaj ofte profesinivelaj. Laŭ persona ŝato precipe laŭdindas la Internacia Arta Vespero, kie aperis amatoraj artistoj el 40 landoj. Kaj apoteoze kantis la efemera kongresa koruso, kiun rekompencis tondra aplaŭdo. Iom ĝenis min la jeno : kiel en multnombraj landoj, la konsentesprima anglusona « OK » nun ankaŭ invadis Esperantujon. Kiam Zamenhof siatempe elektis “jes”, ĝi ankoraŭ ne disradiis la simbolan potencon de la nuna “OK”. Sed ĉu mia raportfina atentigo fruktos en la esperantistaro????



Ĉu la samo aŭdeblos dum la venontjara UK en Aruŝa (Tanzanio)? Ties LKK-anoj prezentis sian landon kun nekredebla entuziasmo!

La perfekta virino ...

El Torino alportis al mi amiko Karlo Votoček por
Legajoj, Sylvain Lelarge, la aŭtoro

En la jaro du mil forpasis mia plej ŝtata onklo Jano. Li aĝis cent jarojn. Li belaspektis kiel ... kaj estis humurplena kiel ... ekstreme kultivita kaj ĝentila, fortika kiel ... kaj aldone riĉa kiel ... La virinoj svarmis ĉirkaŭ li kiel ... muŝoj ĉirkaŭ mielo. Sed malgraŭ tio li ĉiam restis fraŭlo.

Foje pro scivolemo mi pridemandis lin, ĉu li neniam volis edziĝi.

„Oh, jes,“ li respondis. „Kiam mi estis juna (kiel ...) mi certe fajre deziris edziĝi ... sed nur kun la perfekta virino!“

„Kaj ĉu vi sukcesis trovi ŝin?“

„Ne estis facile! En Parizo, kie mi vivis, neniu plaĉis al mi ... Do, ĉar mi havis tempon kaj monon, mi decidis iri piede serĉi ŝin tra tuta Eŭropo ĝis mi trovos ŝin. Do mi ekvojaĝis suden kaj alvenis post kelkaj semajnoj da paŝado en Dijonon, la urbo de la fama mustardo ...“

„La mustardo! Do viaj sensiloj estis stimulataj, ĉu ne? Kio okazis tie?“

„Tie mi tuj dum nokta promenado trafis perfektan virion. Ŝi estis bela kiel ... kaj pasia kiel :::“

„Rakontu jam! Ĉu funkciis la afero?“

„Neniel!“

„Kial?“

„Ŝi ne havis cerbon. Ŝi estis stulta kiel ... Do, mi rapide eskapis ĝis Lyon, kies kuirarto estas prave mondfama! En restaŭracio vespere mi hazarde konatiĝis kun la vera perfekta virino! Ŝi ne nur estis bela kiel ... kaj pasia kiel ... inteligenta, brila kiel ...“

„Nekredeble! Do, jen ŝi?“

„Bedaŭrinde ne!“

„Kial?“

„Ŝi estis senkorulino, kruela kaj falskora kiel ... Mi denove haste fuĝis el granda danĝero. Post pluraj pliaj semajnoj da vagado tras la Alpoj mi alvenis en Italujon. En Torinon ... Tie mi hazarde eniris en luksan kongresejon, kie oni parolis ekzotikan lingvon ... Vi ne kredos min, sed tie – fulmotondro – sidis vidalvide min, la UNIKA, PERFEKTA VIRINO! Ŝi estis bela kiel ... inteligenta kiel ... kaj bonkora kiel ...“

„Ververe? Do certe vi tuj proponis al ŝi geedziĝon! Kaj ĉu ŝi konsentis ... edziniĝi?“

„Bedaŭrinde ne“

„Kial do?“

„Ŝi atendis la perfektan viron ...“



Ĉu vi scias, ke vi povas planti arahidojn hejme en poto?

Vi konas ilin salitajn en saketo en vendejo, sed ne ĉiuj scias, kiel ili aspektas „vivaj“ kaj kio okazas, ĝis ili venos al nia telereto. Ilia scienca nomo estas *Arachis hypogaea*. Homoj nomas ilin ternuksetoj, sed ili la nuksoj ne estas. Ili estas guŝlegomoj. La planto alta 25-40 cm aspektas ordinare ekzemple kiel trifolio kun etaj flavaj monoikaj floroj. Post polenizo la pedunklo rapide celas al tero kaj faras sub tero ĝis 6 centimetroj profunde guŝojn kun 2-3 semoj. La planto ŝatas varmon kaj nepezan argilon, ne ŝatas malvarmon kaj marĉaĵon. Post maturiĝo de fruktoj la planto velkas.

Vi mem povas kreskigi arahidojn en ĝardeno, aŭ en poto hejme. Nur vi devas aĉeti konvenajn semojn verŝajne pere reto. Se vi semos printempe, aŭtune vi ricevos „nuksetojn“. La plantoj bezonas almenaŭ kvin monatojn da bela varma vetero kaj sufiĉe da akvo. Post maturiĝo de fruktoj la planto mortos.

La planto devenas el Suda Ameriko. La homojn tie plantis ĝin jam 4 jarmiloj antaŭ Kristo. Oni konas 83 specojn.



Laŭ reta
„Receptár“, JoDo,
2023.



Eta kafa lukso renkontas egan sukceson en Korea Respubliko

La Korea Respubliko fariĝis la tria plej granda kafbutika merkato en la mondo en nur jardeko, kun vera furoro pri “instagrameblaj” kafejoj. Oni komence supozis, ke la kreskanta postulo rezultos de la rapida vivstilo en la urboj de la lando kaj la influo de internaciaj kafĉenoj, sed fakte estis tio populara televidserio kiu ekigis la tendencon.

En 2021, hejmoj elspezis trioble pli por kafo ol por kimĉio, konata nacia bazmanĝaĵo.

El Kuriero, Sooyoung Oh, ĵurnalisto, Seulo,
Korea Respubliko



Mi aŭdacas antaŭvidi, ke iam ekzistos universala lingvo tre facila por lerni, prononci kaj skribi. Kaj, kio pli gravas, tiu lingvo helpas rezonadon prezentante ĉiujn ideojn tiel klare, ke estos preskaŭ neeble erari.

(Kartezio, letero en 1629)

La letero de Boulton al Jasuo

Mi proponas al vi kara amiko Jasuo sendi tiun enkondukon al ĉiuj la partoprenontoj de nia Sumoo en novembro:

« La mondo, kiel ni konas ĝin, estas dolorplena, kaj ĉiu feliĉo, ĉiu plezuro, ŝajnas kiel bela eta floro, kiu kreskas en rokfendaĵo. Mi tamen kredas, ke la homoj povas plibonigi nian tragikan mondon, ĝis ĝojo almenaŭ pli ol doloro abundos.

Eble nia unua eraro povas esti, ke ni ne sufiĉe amas nian mondon, ne sufiĉe perceptas ĝojon, kaj tial ne sufiĉe respektas la vivon. Eble ni devas lerni, kiel ami la mondon, por ne detruiri aŭ sangkovri ĝin.

Mi ne estas filozofo aŭ teologo; mi devas mem multe lukti kontraŭ pesimismo kaj melankolio; mi ofte verkas pri malgajaj temoj kaj pri problemoj doloraj. Sed nun mi volas, en tiu ĉi volumeto, disdonadi ridon, belon kaj feliĉajn emociojn. Multaj el tiuj ĉi poemetoj estas bagatelaj; sed io ajn, kio aldonas ion al la sumo de homa feliĉo, ne povas esti tute malgrava.

Cent Ĝojkantoj : oni povus verki mil, eĉ en la nuna mondo ; sed eble mi povos iomete helpi al miaj homaj gefratoj pli konscii pri siaj grandaj kaj malgrandaj ĝojoj, pli serĉi tiujn floretojn en la rokfendaĵoj. Jen mia celo.»



Marjorie Boulton, Stoke-on-Trent,
Julio 1957

KIO ESTAS ESPERANTISTO?

Kompreneble, estas esperantistoj en la tuta mondo sed kelkaj ne konas ĝis nun la diferencon inter ĉi tiuj du konceptoj: **Esperantisto kaj esperantano**. Ekirante de la konkreta signifo « esperantisto » estas homo, kiu praktikas Esperanton nur parolante ĝin, dum « esperantano » estas tiu, kiu praktikas la Zamenhofajn principojn aŭ kiu pli profunde aplikas la verajn principojn de Ludoviko Lazaro Zamenhof.

De Honoré Sebuhero, Rutshuru, DR Kongo, la 30-an de decembro 2023

Al mi konata virino, dediĉanta sin al jogo - Najasvámí Jyotis - iam sendis al mi ion pri ideoj de Paramhansa Jógananda, kiun ŝi admiras. Kelkaj eldiroj absorbis mian atenton.

„Montru al mi viajn amikojn kaj mi diros al vi, kia estos via estonteco.“

Socio, en kiu ni vivas, estas por ni tre grava. Se vi lasas vian mantelon en ĉambro, kie la homoj fumas, baldaŭ ĝi malodoros je fumo. Same okazos kun via menso en rondo de la homoj pesimismaj aŭ feliĉaj. La medio estas pli forta ol volo. Kutime ni pasas tempon kun amikoj, kiujn ni mem elektas. Sed ni pasas tempon eĉ kun personoj el libroj, filmoj, TVserioj. Demandu vin mem, ĉu tiuj „homoj“ estas bonaj.

Alia afero, kiu influas nin, estas memoraĵoj kaj niaj pensoj, kiujn ni kutime akceptas. Ne bonas teni aĉan personon kaj denove ĝin travivadi, ĉar tiam ĝi nestiĝas kaj restadas. Nian memoron ni ricevis, por ke ni tenu bonajn spertojn. Forlasu malbonajn pasintajn pensojn kaj evitu revokon de ili, rifuzu ilin.

JoDo, 2024.

MOBILKOJ

Marian Zdankowski, Buletini 175, septembro 2023.

Trinki! Triiinki... Mi volas trinki kruele. La lango seka al blato. Saharo. Se almenaŭ unu guto da likvaĵo... iu ajn... unu pluvan guteton. Ja eĉ la herbo reviviĝas post la pluvo... Eble unu guteto de roso reakceptus la memoron? Estus iom pli malpeze, iomete pli facile. Kaj la kapo. Kaj mia kapo. Kial ĝi tiom doloras? Sed ĝi ne doloras. Doloregas! Ĝi rompiĝas! Kaj mi ne scias, kio estas pli malbona: Saharo en mia buŝo aŭ tiu ĉi terura kapdoloro? Nekredebla doloro. Mi estas tiel doloranta, ke apenaŭ povas moviĝi. Senĉese io zumas kaj tondras en mia kapo. Ĝi pulsas onde. Ne sonorilegoj, ne artileria kanonado ... De kie ĝi venas? Kial? Kio okazis? Sed mi vivas! Mi sentas doloron — tio signifas, ke mi vivas. Ĉar kial mi ne vivus? Tiom da demandoj. Respondojn el nenie. Mi pensas, ke mi ege ebriiĝis... Tio klarigus ion. Sed tio estas nenio nova. Ja ni ofte tiel drinkadis ... Ĉiam ekstreme. Ho, kiel akre! Kaj ĉiam pro iu okazo. Drinki sen okazo - estas ebrieco. Kaj ni ja ne estas drinkuloj! Ĉiam estis okazo. Kaj poste ĉiam ni estas sekigitaj senkompatate. Ha, kiel tiam gustumis kefiro, acida lakto, kukuma suko! Kaj se estis fojfoje biero... Ho, Dio! La botelo estis malplenigita en sekundo. Kolegoj helpadis, kiel ili povis. Kie ili estas nune? Kaj kie mi estas? Kio okazas? Mi memoras, kio okazis antaŭhieraŭ, sed mi memoras nenion pri hieraŭ. Antaŭhieraŭ mi pasigis la nokton kun Nataŝa. Mi forgesos neniam ŝiajn belajn mamojn. Firmajn, formajn, allogajn. Kaj ne malgrandajn ... Kaj Nataŝa ŝatis min. Eble eĉ amis? Ŝi asertis, ke mi estas alia ol la ceteraj. Ke mi zorgas pri mi mem. Ŝi ne sciis, ke mia patrino zorgis pri mia vestaĵo, kaj mi — por doni al mi ian elegantecon — drinkadis antaŭ

renkontiĝo kun Nataŝa boteleton da parfumo. Tio desinfektis mian buŝon, donis bonan spiron, kaj mi ne bezonis lavi la dentojn. Parfumoj devus esti la plej malmultekostaj, por ke ili enhavu multe da spirito. Sed tio estis antaŭ du tagoj. Kaj kio okazis hieraŭ? Kio okazis hieraŭ? Kaj kie mi estas nun ĉiuokaze? Estas mallarĝe ĉi tie. Mi ne povas moviĝi. Nek per la piedo nek ... nu ... per la mano mi povas movi iom. Mi pensas, ke mi kuŝas sur la aŭtomobila planko... Ne sole. Mi palpis, ke kelkaj aliaj homoj kuŝas apud mi. Eble miaj amikoj? La aŭto veturas. Mi havas la impreson, ke ĝi veturas jam tro longe. Neniu fenestroj. Mallume. Kaj sufoke. Fiodoraĉas kiel vomajo... Sed... Mi komencas iom post iom rememori..... Kvazaŭ tra nebulo. La situo komenciĝas klariĝi. Kiam mi memoras, multaj aferoj evidentiĝas. Ni ĉiuj samaĝas, kaj hieraŭ tuta nia grupo ricevis alvokon al la armeo. Ni eĉ ne estas dudek-jaraĝaj - kaj tamen mobilizitaj al la armeo. Pro tio oni nomas nin "mobilkvoj". Ni ne volas batali. Tiu ĉi ne estas nia milito. Sed oni ordonas al ni "savi" niajn fratojn de la nazioj. Ni volis kune forfuĝi trans la limon. Kiun ajn! Sed antaŭ kelkaj tagoj oni fermis ĉiujn limojn. Laŭdire, grandegaj vicoj formiĝis ĉe la landlimoj. Tro multaj volis forkuri. Nur unu sola limo estas ankoraŭ "malfermita"! Sed ni povas transiri ĝin nur en kirasa trupveturilo. Kiel "mobilkvoj"... Sed tio ja ne estas mia milito! Mi ne elpensis ĝin. Mi ne volas pafi. Mi ne volas mortigi. Kaj morti... Mi ne tre komprenas, kial mi devus pafi "kunfratojn"? Mi estas pacifisto... Mi estas kontraŭ milito. Same kiel ĉiuj miaj drinkamikoj. Ni kune forbruligis niajn mobilizkartojn kaj ebrigigis nin ĝis senkonscio. Tial mi havas tiun teruran kapdoloron. Nu, mi supozas, ke verŝajne tio estas la kialo... Sed kiel sufoke ĉi tie. Kaj mallume. Mi sentas, ke mi baldaŭ vomos... Kaj hieraŭ... tamen nur hieraŭ... Mi memoras tre neklare, kiel ni akompanis Igoron ĝis lia hejmo... Kaj patrolo de la milita polico nin haltigis, saltante el


ĝendarmeria aŭto. Ni promenis meze de la urbo kaj meze de la strato. Apenaŭ vivantaj... duone svenintaj... sur malfirmaj piedoj... Ni havis neniujn dokumentojn kun ni. Eble se ni ne urinus meze de la strato, sed bedaŭrinde... La komandanto de la patrolo ordonis "ĉiujn en la kamionon"! Kiam la grandaj ĝendarmoj ekkaptis nin, neniue el la kamaradoj havis la forton por defendi sin. Ili prenis po unu el ni - kaj ĵetadis en la aŭton. Kiam ili kolere kaptis min - la plej malpezan - kaj ĵetis min enen... mi sentis, ke mia kapo trafis ion forte. Mi pensis, ke mia kapo rompiĝos. Tia terura, terurega, obtuza doloro. Ĝi pulsas en ondoj. Kaj sango fluas. Kaj mi pensas, ke tiam mi perdis la konscion. Unuafoje... Malhele. Mallarĝe. Sen iu ajn sono... Kio okazas? Sango fluas. El mia kapo... kaj ĝi doloras terure. Kion? Denove? Kun granda peno mi sukcesis tuŝi la kapon. Ĉar la manoj rigidas kaj malmultas da spaco. Sed mi tuŝis... Neeblas! Mi estas pure razita. Mi pensas, ke mi verŝajne scias kialon. La filmo antaŭ la okuloj rapidigas la fluon. Tion jam estis. Mi vidis tion! Mi memoras, ke iam mi jam havis similan situacion. Sed tiam estis aŭto. Milita aŭto, kiu nin prenis el la strato, kaj ĉar ni ne havis dokumentojn - ili transportis nin al la kazerno. Tie oni ŝprucigis nin per malvarma akvo. Tio iom vekis nin. Oni ĵetis al ni kelkajn uniformojn kaj botojn. Ĉar estis nokto - ili ordonis al ni dormi. La filmo iom rapidiĝas. Antaŭ la okuloj pasas kelkajn tagojn, kiam oni donis al ni fusilojn kaj instruis pafi. La filmo subite haltas, ĉar estas tre malfacile ĉion kompreni. Tiam, pli frue, en tiu milita aŭto estis sufoko, sed mi povis iom turniĝi, kaj ĉi tie... Io grava en tiu memorfilmeto... Konversacioj kun Igor... Ankaŭ al li malplaĉas la kazerno ĉi tie. Kaj la tuta armeo. Ankaŭ li ne volas militi. Li konsideras, same kiel mi, ke tio ne estas lia milito. Li diras, ke ĉio pro malsanaj ambicioj de la aŭtoritatuloj (politikistoj, financistoj kaj aliaj riĉuloj), kiuj kaptas junajn virojn al armeo, por ke ili mortigu aliajn junajn

homojn dum militoj. Multe da junuloj mortas en militoj. Tro multe. Ne dekoj, ne centoj, sed miloj, dekoj da miloj de junaj viroj, kies vivo nur komenciĝas... Sed ili havas nenion por diri kaj laŭ ordono devas marŝi kontraŭ pafilojn, sub kuglojn... Ĉar generaloj kaj politikistoj tion deziras... Ili ordonas... Mi rimarkis, ke post tiu mallonga instruado en la kazerno, Igor fariĝis eĉ pli granda pacifisto ol mi. Li diras, ke iuj knaboj, kiuj estas plenaj de natura agreso, devus iri al la armeo. Ili malŝarĝos sian energion tie. Tie estas ilia loko. Aŭ la "kontraktuloj"?... Ili volas gajni monon, laborante en la armeo kaj por la armeo - ili iru al la armeo. Se plaĉas la armeo – ili iru al ĝi. Sed ni - pacifistoj? Kial ni devas propran vivon redoni? Nian propran junan vivon? Ni konscias, ke ĉi tiu milito ne estas la nia... ke ĉi tio estas milita propagando prezentanta la realon tiel, ke juna homo ekmalamu la alian... trans la fronto... en alia uniformo... Igor rememorigas, ke kiam la milito komenciĝis, niaj trupoj transiris la limon de ilia lando, por savi niajn "fratojn" de ilia 'naziisma' registaro. Krome, se ni konscias, ke multaj el la komandstabo (komandantoj de diversaj niveloj - generaloj, oficiroj) estas senespere nekompetentaj, kaj eĉ simple stultaj, kio kaŭzas nenecesajn homperdojn - la konkludo estas, ke oni devas timi armeon. Mi ne diras ĉi tie pri drinkuloj kaj seksemuloj inter oficiroj, sed ili ekzistas ankaŭ, bedaŭrinde... Ni ankaŭ sciis ĝenerale, ke por pli granda "kuraĝigo" ataki la malamikon – soldatoj ricevas vodkon antaŭ atako. Kaj... dum batalo, post linio de soldatoj, kiu atakas malamikon - malantaŭ de atakantoj iras specialaj murdistoj (gviditaj de politika oficiro) kiuj pafas al siaj retiriĝantaj soldatoj. Post longaj, flustritaj konversacioj, Igor kaj mi venis al la konkludo, ke ni havas neniun elekton... Tuj, kiam ni ricevos armilojn — ni, kiel pacifistoj, likvidos la plej altgradajn oficirojn en nia atingo. Ĉu ne tiumaniere devas fari pacifistoj? Ĉar kion alian ni povas

fari? Se aliaj ankoraŭ pensus tiel, eble estus pli bone... Sed nun, ĉu ili mortigos nin dum atakado de la 'malamikoj', ĉu ni trafos minon, ĉu ni estos 'debranĉitaj' de snajpero - kia diferenco? Sed tiel... ni faros almenaŭ ion bonan... Sed ni devas atendi iomete. Mi havas altan febron. Sanitaristoj venos por porti min al lazareto. Denove paŭzo kaj la voĉo de Igoro diranta, ke iu subaŭskultis niajn diskutojn kaj raportis al la komandanto, kaj baldaŭ ili venos por ni... kaj eble ni estos juĝataj kaj verŝajne ekzekutitaj pro niaj planoj likvidi oficiojn... Ĝi estas terura! Kaj jes, vere, homoj eniras! Mi petegas, ke ili ne pafu! Ili diras, ke ili ne faros tion. Ke ili donas sian honoran vorton, ke ili ne, ili ne pafos. Kial mi ne devus kredi al ili? Ili diras, ke vere, ili devis raporti kie necesis, sed ni estu trankvilaj. Ili nur devas fari injekton por tiu alta febro. Do, ili faru... mi eĉ ne sentas pikon... Kaj eble tiam mi perdis konscion... Malfacile estas spiri. Pli kaj pli malfacile. Ne estas aero. Mankas aero. Mallumo kaj mallarĝe. Kie mi estas? Kial mi ne povas turniĝi? Per fingroj mi sentas lignon. Flanke estas ligno. Certe tabuloj... Super mia kapo ankaŭ estas ligno. Mi povas leviĝi nur iomete... Mi batis la tabulojn super mia kapo. Kaj malfacile spiri... Tre malfacile... Ege malfacile... La aero mankas al mi... Iuj steloj antaŭ miaj okuloj... iuj makuloj... iuj...



En urbo Pilzeno inaŭguris monumenton



La monumento estas alta ses metroj. La artaĵo „Flugiloj de espero“ bildiĝas anĝelon. La aŭtoro estas Jiří Štrunc. La statuon pagis asocio

Arsanat fondita en marto kaj urbodomo Pilzeno de la kvartalo Slovany kaj pluraj mecenatoj. La statuo estis inaugurita en oktobro 2023.

„La asocio Arsanat celas instalaĵojn de artaĵoj kaj metiaĵoj sur konvenaj lokoj en urboj, vilaĝoj kaj en naturo por alporti al civitanoj artsentojn al kultura kaj spirita loka heredaĵo, subteni ĝojon kaj doni bonan humoron al pretenpasantoj en tempo plena de timo pri estonto, pere de arto kun espero al pli bona mondo kaj dankemon je bono, kiu nin superstaras.“

https://www.idnes.cz/plzen/zpravy/socha-vyhlidka-bozkov-napis-poboureni-umo-starosta-odstraneni.A231025_144946_plzen-zpravy_vb

Apud la statuo troviĝis metala tabulo kun jena surskribo:

„Estas jaro 2023. En nia respubliko regas koalicio de kvin politikaj partioj de premiero Petr Fiala. Rapide malpliboniĝas vivo de ordinaraĵoj. Tutmonde aperas tendenco manipulasi homojn. Prezoj de ĉio

flugas supren. Pasis du jaroj de komenco de la milito de Rusio kaj Ukrainio, kiun subtenas Eŭropunio, NATO kaj Usono. Tutmonde elitaro tendencas manipuli homaron al sia propra prospero. Mensogo kiel maniero de vivo anastataŭis veron. Memoru: vi naskiĝis por libero!“

La tabulo en novembro malaperis laŭ ordono de la urbestro.



Reago de la prezidanto de la asocio Jiří Štrunc: „Ni volantas forigi la tabulon tuj, sed ni fakte forigos veron.“



Laŭ kelkaj ĵurnalistaj artikoloj tradukis JoDo, decembro 2023.

Legendo el norda Bohemio

Pri du fratoj

Proksime de la urbo Ĉeĥa Tilio (*Česká Lípa*) estas blanka kapeleto por memoro pri du fratoj, kiuj batalis dum milito en kontraŭaj flankoj. La legendo, kiu havas veran bazon, devenas el milito de Prusio kontraŭ Aŭstrio en 18a jarcento sur batalejo proksime de la urbo. Tie estas ankaŭ unikaj surskriboj ĉizitaj en rokojn kaj murojn de bastiono.

Unu frato foriris antaŭlonge de la milito labori eksterlanden kaj aperis kiel germana soldato en tiu-ĉi milito. Lia frato restis en Bohemio kaj lin rekrutis en aŭstrian armeon. Dum batalo la fratoj renkontis reciproke dum sanga batalo, sed ne rekonis sin. Kiam la „prusa soldato“ estis vundita, kaj li adiaŭis sian vivon, lia „aŭstria“ frato ekkonis lin havante sabron super li. Ili restis kune kaj dezertis de armeoj. La fratoj konstruis poste tiun-ĉi blankan kapeleton.

JoDo, januaro 2024



La dua legendo el norda Bohemio

La pano por mizeruloj

En vilaĝo *Písečná* proksime de *Dobranov* antaŭlonge vivis vidvino kun filo Martin kaj filino Marta. Ili vivis kontente, la mizero ilin ne trafis. Kiam infanoj maturiĝis, patrino grave malsaniĝis. Ŝi sentis, ke ŝiaj tagoj mallongiĝas. Ŝi vokis gefilojn al sia lito kaj petegis ilin esti bonaj homoj, ĉar ŝi baldaŭ forpasos. Ĉefe ŝi petis ilin antaŭ riĉuloj ne kliniĝi kaj malriĉulojn memori kaj kontraŭ ili ne superi sin. Ŝia alia lasta deziro estis, ke post ŝia forpaso ili trovu ĉiun farunon, kiu estas en domo, vere ĉiun kaj baku el ĝi panon kaj disdonu ĝin al simplaj homoj, alie ŝi ne trovos kontenton kaj pacon. Martin kun Marta promesis tion fari kaj petis patrinon, ke ŝi ne foriru kaj ne lasu ilin solaj, Sed la morto estis pli forta ol la amo en tiu familio. La patrino de tiu tempo jam ne parolis kaj post kelkaj tagoj ŝi mortis. Kun trista funebrofestoj infanoj adiaŭis patrinon kaj tuj rapidis plenumi promeson de ilia patrino. Ili kolektis ĉiun farunon en la provizejo, en kuirejo kaj bakis panon kaj ĝin disdonis al bezonantaj homoj. La homoj dankis al infanoj kaj al forpasita patrino kaj laŭdis bonan agon. Sed la legendo ankoraŭ ne finiĝis. Kiam venis la dua tago post enterigo de la patrino, ekaŭdis Martin nokte brueton ĉirkaŭ domo. Poste eĉ frapeton sur fenestron. Martin vekis Marton kaj ambaŭ ekaŭdis voĉon similan al la patrinan, kiu ĝemis. Poste ankoraŭ silentete ekis frapeto sur fenestron kaj poste eksilentis. Kun timo rigardis infanoj en mallumon, sed ili vidis nenion. Longe ili ne povis dormi, sed plu aŭdis nenion. Je la venonta nokto okazis same kaj poste same. Martin kun fratino petis helpon de saĝaj najbaroj. Maljunuloj konsilis, konsilis, sed nenio helpis. Nur poste maljuna paŝtisto *Jíra* venis kaj petis mem tranokti en la domo. *Jíra* estis homo saĝa, pensema.

Ĉion kion li en vivo vidis kaj aŭdis, ĉion en memoron kolektis kaj el memoro li prenadis kiel el la puto de saĝeco.

Kiam li en nokto la ĝemon kaj frapeton spertis, li pripensis. Poste li volis, ke infanoj rakontu al li pri lastaj tagoj kaj vortoj de la patrino. „Vi plenigis la deziron de via patrino, sed ŝi tamen suferas. Ni devas denove traserĉi tutan domon. Certe vi ion ne perfekte faris kaj tio vian patrinon turmentas.“ Ili komencis serĉi. Nenio restis sur sia loko, ĉu kuleroj, litoj, ŝrankoj, ĉio. Kaj vidu! En kamero ili trovis post komodo malgrandan poteton kun iom da faruno. Knabino tuj el faruno bakis malgrandan paneton. Martin ĝin donacis al la paŝtisto *Jira* malriĉa, sed riĉa je saĝeco. Nokte jam la ĝemado kaj frapetado ne okazis. Maljuna paŝtisto la paneton kaŝis, ne formanĝis, Lia familio heredis tiun kiel ŝtono malmolan paneton kiel raran memoraĵon.

Dum grandaj militoj la paneto perdiĝis, kiel multaj aliaj monumentaĵoj.

JoDo, januaro 2024.



Sekreto de ĉeĥa eldiro

***být z něčeho jelen* – fariĝi sin cervo, cerviĝi** – signifas: esti konfuzita, malsprita, ne kompreni. La eldiro aperis dum unua mondmilito, kiam ĉeĥaj soldatoj batalis kune kun hungaraj soldatoj en aŭstria armeo. La hungaroj prezentis sin per krio „*jelen*“, hungare: „mi ĉeestas“. La eldiro pluvivas. Oni malmemoris komplete la devenon.

Princo amanta mavan Reĝinon, kiu lin tentalogis...

Jan Šik, tradukis Margit Turková

Eksonoris sonorilo – de l'fabelo estas fino ... **fabelo pri Neĝulineto**

La fabeloj ĉiam finiĝas bone. Kaj ĉiuj rakontoj havas sian komencon kaj sian finon. Sed en ĉiu fino ĉiam troviĝas nova komenco ...



La ĉevalo nur malfacile eligis siajn kruojn, kiuj eniĝadis en la vojkonton. La Princo devis elseliĝi kaj de tempo al tempo tiri ĝin per brido. Komenciĝis ja vintrosezono kaj en la aero flugetis malgrandaj neĝflokoj, kiuj post la terenfalo degelis. Kiam la vojo finiĝis, mont riĝis antaŭ li malgranda kabaneto. Li alnodis la ĉevalon al pino kaj senseligis ĝin, por ke ĝi iom ripozu.

Enirinte la domon li ektuŝbatis sian kapon en pordkadro. La plafono ene estis malalta, li devis iom kurbiĝi, tial lin doloris la dorso. Li perpleksplene algapis en la mezon de la ĉambro. Tie ĉi estis glasa ĉerko kaj en ĝi kuŝis knabino. Ĉarmega – neniam li tian vidis. Vestita en blua kostumo kaj neĝblanka en la vizaĝo. Subtilaj vizaĝtraĵoj, kiuj allogis por

karesi kaj longa nigra hararo estis sternita sur malgranda kapkuseneto. Ŝi aspektis morta.

Ĉirkaŭ la ĉerko sur la planko brulis grandaj kandeloj. Sep da ili. Entute **ĉio, kio en la ĉambro troviĝis, estis je sepnombre. En la malgrandeta kuirejeto**, ĉe unu flanko de la kabaneto, staris malgranda tablo, sur ĝi sep teleretoj, sep kuleretoj kaj ĉe ĝi sep seĝetoj. En la kontraŭa ekstremo premapudiĝis sep litetoj. Li ne sciis, kion pri la neordinara loko pripensi. Li alpaŝis la ĉerkon kaj levis la kovrilon por ekscii, ĉu la knabino spiras. Kiam Princo de proksimo vidis ŝiajn ruĝajn lipojn, ektorniĝis lia kapo.

Li ne rezistis, mallevis sian kapon kaj pliproksimigis al ŝi la vizaĝon. Momenton li tuŝproksime rigardis al ŝia beleco, subite fermis la okulojn kaj kisis ŝin. Ŝi ekspiris tiel neatendite abrupte, ke li ektimiĝis. Ŝi malrapide en la ĉerko eksidiĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Ŝi ekvidis la Princon, prenis lin je la mano kaj kune ili sidiĝis sur malgrandajn seĝetojn ĉe la tablo. Ŝi ĉion rakontis al li: pri sia infanaĝo, pri la mava Reĝino, pri la venenigita pomo kaj pri la sep gnomoj. Tuj ili enamiĝis reciproke.

Post la geedziĝceremonio ili komencis vivi kune. Baldaŭ ili havis amason da zorgoj, ĉar oni devis prizorgi du reĝolandojn, kaj gnomoj jam ne emis ilin helpadi. La Neĝulino vivis ĉe la Princo en kastelo, kie estis da ĉio sufiĉe. En la alia vivis la mava Reĝino, kiun ili ne forpelis, ĉar ili ŝin pardonis. Ŝia propra kastelo estis malnova kaj bezonis multe da riparoj. La Princo devis ĉion organizi sur la loko, li estis ofte el sia hejmo. Krome ĉion komplikis liaj gepatroj. Ja ili regis la landon kaj eĉ miksiĝis en la geedzan vivon de sia filo kaj Neĝulino.

Post ioma tempo la Princo kaj Neĝulino komencis inter si kvereli. Problemoj kaj malakordiĝoj en ilia vivo estiĝis ĉiutagaj; kaj infanoj ne alvenadis ...

Ne daŭris longe kaj rimarkis tion ankaŭ la mava Reĝino.

Princo kaj Reĝino sidis komune ĉe la planoj de la kastelo kaj pritraktis ĝian tegmentorekonstruon.

„Hodiaŭ vi estas iom ĉagrena, Princo,“ – diris la Reĝino. La Princo ŝin alrigardis kaj diris nenion, nur movis la manon kaj mallevis siajn okulojn



denove al la planoj. Li entute ne povis koncentriĝi. Matene li kverelis kun la Neĝulino pro sia patrino, sed hodiaŭ estis pri la Reĝino io nova kaj nekutima. Io, kio lin multe malkoncentrigis. Pasis komento – ol li divenis. Li levis la okulojn kaj ridetis.

„Nenio – nur hodiaŭ vi tre belaspektas, Reĝino.“ La Reĝino ja hodiaŭ survestis sian plej belan kostumon, kaj la antaŭan tagon frizisto mallongigis ŝian hararon. Same kiel la Neĝulino – ankaŭ ŝi havis nigrajn harojn. Ŝia figuro estis simile perfekta. Nur ŝi estis pli alta, longaj kruroj, altaj kalkanumoj – do ŝajnis, ke ŝi al ĉiuj rigardas desupre.

Kvankam ŝi estis mava, ŝi nubmienis en spegulo nur al si mem. Al aliaj ŝi kapablis mieni afable. Apenaŭ oni eksciis, ke ŝi estas je dek jaroj pli maljuna ol la Princo. Ŝi estis tre alloga virino en sia plej favora aĝo. Ja – en la reĝolando estis dekomence ŝi la plej ĉarma ol plenkreskis la Neĝulino. La spegulon ŝi disrompis, kiam ŝi en ĝi ekvidis la Neĝulinon, sed tamen estis fakto, ke ŝi estis nur paŝeton post tiu sia konkurentino. Longe jam ŝi cerbumis, kiel la Princon allogi. Montriĝis ja, ke la venenigita pomo ne estis tia plej bona vojo. Ŝi estis preparita uzi por Princo pli efikan metodon.

Ŝi akompanis la Princon al la kastelkorto, kie li surseliĝis kaj forgalopis. La reĝino al li longe mansvingis. Enirinte la

arbaron, li sin korpturnis kaj ankaŭ mansvingis al la Reĝino. Ŝi ridetis kaj ekpensis: Kaptita ...

De tiam la princo venadis ĉiutage kaj ofte restis ĝis vespero. Kun la Neĝulino li parolis ĉiam pli kaj pli malofte, kun la Reĝino ĉiam pli kaj pli ofte. Post longa tempo li havis emon por ridi. La Reĝino paroladis allogmaniere pri kiu-ajn temo. Ŝi havis vivresumon kaj vivspertojn pli riĉajn ol la Neĝulino. Ŝi aŭskultis komprenplene la plendojn de princo, liajn malfacilaĵojn, liajn malsukcesojn. Ŝi silentis kaj kapjesadis kaj la princo sentis bonfarton ĉe ŝi...

Iun tagon li restis ĝisnokte. La Reĝino igis prepari vespermanĝon. Post la manĝo ŝi sidis kun la Princo en kastelĉambreto. La uzita manĝilaro estis el la rondotableto forigita kaj nun sur ĝi bruligis du kandeloj kaj staris du glasoj kun ruĝa vino. Ili ridis kunekun la tutan vesperon. La Princo eĉ ne rememoris, kiam laste li sentis sin tiom bone kun la Neĝulino hejme. Ĉi vespere li ŝin tute forgesis ... Pasio iam superregas teneron.

Kiam li ion diris, la Reĝino ĉiam ridetis kaj mole dume tuŝis lian brakon. En certa momento ambaŭ ĉesis paroli rigardante reciproke en la okulojn. La Princo ekscitiĝis. Ankaŭ ŝi havis amsopiron en la okuloj. La Princo prenis ŝian manon en la sian. Ĝi estis varma, kiel ŝi estus glutinta ĉiujn sunradiojn de varmega somera tagmezo. La Princo kisis ŝiajn fingrojn, unu post la alia. Poste li penetris per sia lango en ŝian buŝon kaj ekstartis eksplodon sur ambaŭ flankoj. Dum la Neĝulino estis tenera, la reĝino estis pasia, kion la Princo ĝuis pli. Ambaŭ ekstaris kaj li piedforpuŝis sidejon ĝis la ĉambromezo. La tremanta Reĝino dorsiĝis al muro. La Princo avide alpremis sin al ŝi, kaj ...

Hejmen li ne revenis. Restis kun la Reĝino. La Neĝulino lin ne atendis, al ŝi estis egale, ke la Princo ne estas hejme, ŝi iris baldaŭ dormi ... Kiam li finfine la postan tagon tagmeze

alvenis, ŝi eĉ ne demandis, kial li venas tiom malfrue. Ne daŭris longe, la Princo translokiĝis al la Reĝino kaj kun la Neĝulino li divorcis.

Haltu, haltu!! ... Tio estas malbona fino. Ĉu la fabelo tiel daŭrigis? Ĉu ne estus pli bone ...

Jen ... La Princo prenis ŝian manon en la sian kaj diris: „Pardonu, mia Reĝino. Estas nur unu en la vasta mondo, kiun mi vere amas - la Neĝulino. Ne koleru, sed mi devas hejmen.“ Poste eksidis sur la ĉevalon kaj forgalopis. Hejme li diris ĉion al sia Neĝulino. En la nokto ili geiĝis ĝis la tagiĝo. La postan tagon ili la mavan Reĝinon forpelis el la kastelo. Kaj ili ambaŭ vivis feliĉe ĝis la morto...

Aŭ la fabelo povus finiĝi pli malbone...

La Princo eksidiĝis sur la ĉevalo kaj forveturis. Estis noktmallumo. La ĉevalo stumblis de vojŝtono, kiun ĝi ne vidis. La Princo falis el la selo teren kaj lia nuko rompiĝis.

Eĉ eblas ...

Kiam la Neĝulino pri la duuloj eksciis, vestŝajnis pomovendistinon. Unu pomon ŝi vendis al la Reĝino. Ĝi estis venenigita. La Princo la Reĝinon ne kisis kaj la gnomoj ŝin ankaŭ ne helpis ...

Eĉ povis la rakonto iri nekutime:

Kiam la Princo revenis hejmen, diris ĉion al Neĝulino. Venontan tagon forveturis ambaŭ al la Reĝino. Ĉiuj konsentiĝis vivi trio-pe-tolere-me en la malnova kastelo, sen siaj gepatroj. La Princo ekhavis du partnerinojn – du la plej belajn virinojn en la reĝlando - kaj estis feliĉa.

La fabelo povas iri eĉ tiamaniere...

La Neĝulino alvenis al la Reĝino por ĉion kun ŝi rezolute pritrakti. Ili komune vespermanĝis. Poste ili ekbruligis du kandelojn sur tableto en saloneto kaj verŝis vinon en du glasojn. Kiam ilin fintrinkis, la Reĝino proksimiĝis al la Neĝulino, karestuŝis ŝian brakon, rigardprofundiĝis en ŝiajn tenerajn belajn okulojn ... La Princo restis sola kaj malfeliĉis ...

Malofte oni travivas vivon kiel en fabeloj. Eĉ malfavoraj rakontoj povas finiĝi per io bela kaj daŭrigi plu. Malfermiĝas novaj vojoj – eĉ miloj da ili ...

La plej belaj fabeloj ne estas rakontataj ĝisfine.

Tradukis Margit Turková.

Feliĉa insulo

El Kubo

Bona diino Atabekso volis krei landon, kie ne vivos rabbestoj, serpentoj kaj vulkanoj. Ŝi volis, ke tie vivus homoj kaj komune vivus kaj laboros kiel fratoj. Kaj tio okazis. La insulo nomiĝis KUBO – feliĉa insulo. En lingvo de homoj – fekunda lando.

Sed malbona dio Mabujo sendis al tiu lando svarmantajn kulojn, por turmenti homojn. La homoj petis bonan diinon pri helpo. Ŝi deklaris: „La malbono efekiĝis, sed nun devas kuloj antaŭ piko, peti homon pri permeso.“

Kaj okazis, ke de tiu momento kulo zumas, antaŭe ol pikas kaj la homo povas ĝin mortigi.

Jozefo de J.Campos Pacheco

El gazeto Juna amiko Nr.3/2011
Jozefo de J.Campos Pacheco.

Unuflanka vidpunkto

de anonimo

Diras juna medicinisto al pli aĝa kolego: „Estas tro da malsanoj, kiel mi trovos la ĝustan?“

Pli sperta kolego konsilas: „Venas fumanto, vi diru, ke la malsano kaŭzis fumado, venas drinkulo, la malsanon kaŭzis brando. Venas dikulo, malsanon kaŭzis obezeco, ĉe sengrasulo – subnutrado. Se la paciento peze laboras aŭ estas sportisto, vi diru, ke li estas tro ŝargita. Al la alia diru, ke la malsano devenas de malmulte la movo. Al junulo, ke temas pri problemo de kresko, al pli aĝa homo, ke la problemoj alportas aĝeco kaj tio estas normala. Kaj kion diri al ŝatantoj de viando, vegetaranoj, sunbrunitaj, nesunbruniĝaj vi jam komprenas kion fari, ĉar vi havas doktoran diplomon. Fine kalkulu mezuradon de sangpremo kaj kontu aliajn montaksojn kaj skribu receptojn por medikamentoj laŭ rekomendo de la plej alte paganta farmakologia peranto. Se la paciento plendus, ke la lastaj medikamentoj ne efikis, eĉ la problemoj fortiĝis, vi diru, ke vi estas doktoro kaj li ne, ke necesas atendi, ĝis la medikamentoj efikos, kaj vi pridubu, ke la paciento prenadis medikamenton regule, eble trinkis alkoholaĵon kaj estas necese daŭrigi kuracadon. Se li venonte plu plendus, ŝanĝu la medikamenton de la dua peranto kaj vi mencios, ke la medikamento devenas de Svisio kaj estas la plej bona kaj ŝajnigu medikamenton kiel ion eksterordinara.“

La juna kuracisto: „Kion fari, se venas averaĝa nefumanto?“

La sperta kuracisto: „Nu, laŭ via humoro vi proklamos lin hipoĥondro kaj sendos lin hejmen, aŭ vi diros, ke la malsano estas psikosomata kaj vi direktigos lin al kamarado psikologo.“

La juna: „Kaj ĉu eĉ poste li persiste alvenas?“

La sperta: „Nu, vi sendos lin al vico de fakaj esploroj kaj li paŭzos verŝajne unu jaro. Se li hazarde ankoraŭ revenus, li havos aliajn problemojn kaj certe ne postulos diagnozon kaj kuracadon.“

La juna: „Dankon. Sendube mi saĝeĝis.“

PRI KVANTUMA TRANSIRO

Vi ŝajne notis, ke la Suna Energio
Jam proksimiĝis al la grado minimuma,
Ĉar komenciĝis Re-Transiro la Kvantuma
En tuta Galaksio, en Planedo nia.
Pli ofte malaperas interret-konekto,
Malbona estas la propago en etero.
Por vi, homar', ne estu la mistero, –
Tio estas prov' de homa intelekto,
Purigo de Racia Kosma Universo
Kontraŭ mizer-disharmonio kaj perverso.
Aperis korupcio, fraŭdo, video-falsaĵoj.
Okazis suicidoj, murdoj, diabla terorismo.
En interreto - fi-blasfemoj, aĉaj mensogaĵoj.
Tutmonde - la minaco de nuklea militismo.
Laŭ profetaĵoj tamen Dudek Kvara Jaro
Favoros por PRUDENTA kaj RACIA Homaro



'La homo naskiĝas kun gestoj'

Tion diris majstro de pantomimo Marcel Marceau, kiu naskiĝis antaŭ 100 jaroj en Strasburgo (orienta regiono de Francio – Alzaco) 500 km oriente de Parizo. (1923-2007)

Marceau havis grandan parkon, al kiu li revenadis ripozi inter siaj longaj vojaĝoj. En jaro 1947 li kreis la karakteron de Bip, klaŭno vestita per nedisigebla ĉapelo kun floro. Bip estas konsiderita la daŭrigo de malnovaj karakteroj (Arlekeno kaj Pierot). Bip, eterna malbonŝanculo, estis submetita al ĉiaj malfeliĉoj kaj tordoj de la sorto; li aperis en kaĝo, en parko, batalis kontraŭ vento dum promeno. Marceau prezentis brilajn, kelkminutajn satirojn pri ĉiaj temoj. Tiu romantika figuro kaŭzis la publikon kaj kritikistoj nomi Marceau "la poeto de gesto". Bip fariĝis la dua identeco de Marceau kaj lia simbolo, rilata al tradicio de Commedia dell'arte aŭ komediaj klasikaĵoj el komenco de la pasinta jarcento kaj el epoko de Jean-Gaspard Debureau (1796-

1846), legenda mimo ĉeĥdevena, kies naskiĝnomo estis Jan Kašpar Dvořák. Dum jardekoj Marceau faris multajn turneojn tra ambaŭ Amerikoj, Afriko, Aŭstralio, Ĉinio, Japanio, Rusio kaj tra Eŭropo. Li estis rekonita kiel la plej granda reprezentanto de la "silenta arto" (L'art du silence).

Transprenite de “ Nova Urbo”

_____ “ Nova Urbo” (Città Nuova / New City) estas internacia socikultura magazino de Fokolara Movado, kiu aperas en kelkdeko da lingvoj. Ĝi antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj, komunumoj kaj – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de ĉi tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996.

Ni homoj, kiuj naskiĝis inter jaroj 1940 – 1960, estas unika generacio, ĉar kiel lastaj ni aŭskultis kaj obeis niajn gepatrojn.

Utiligu nin tuj nun! Lerne de ni, ĝis ni estas vivaj!

Niaj kvalitoj baldaŭ plene vaporigos.



Intervjuo en TV SCAN dum la elsendo START, la 27-an de oktobro 2023, Albanio

Gvidantoj: Viola Gremi kaj Rudi Hizm

o

Rudi: Kial Esperanto ne disvastiĝis, kvankam ĝi solvus la problemon de la interkomunikiĝo. Ĉu nur pro la vetoo de Francio?

Bardhyl Selimi: La kialoj estas politikaj kaj ekonomiaj. La “grandaj” lingvoj estas subtenataj de siaj ŝtatoj. Ekzemple germanoj elspezas centojn da milionoj dolaroj por lernigi sian lingvon al alilandanoj, la francoj same. Ankaŭ en Albanio. Esperantistoj lernas ĝin tute volontule. Ili estas idealistoj, lingvoamantoj. Ne mirinde ke la grandpotencoj faras plejblon por malhelpi la disvastigadon de Esperanto. En la Eŭropa parlamento nun, kiam Britio eliris de EU, nur malplimulto de deputitoj subtenas Esperanton. Kiam ilia nombro transpasos 50 % certe Esperanto povus fariĝis dua helpa interlingvo por EU, almenaŭ. Ĉar ĝi ne ĵaluzigas aliajn popolojn kaj estas facile lernebla.

La plej granda defio estas la refreŝigo de la membraro, ĉar ni maljuniĝis. La junuloj devas esti idealistoj, ĉar Esperanto ne certigas al ili laborlokon samkiel la angla aŭ la germana, Esperanto ne posedas ĉi-tiun luksaĵon, sed simple ĝi donacas plezuron, kiel mi mem spertas.

От кoro: Bardhyl Selimi <bselimi@gmail.com> Albanio



Malvenko estas nur okazo komenci denove kaj plibone.

Luiz Alberto de Oliveira Coelho, Brazilo, 2022. 8. 16,

Kara sumooleganto,

jen tre interesa teksto:

Kelkajn rimarkojn mi kontribuas: pri helpo de Usono, fakte tia ĝi ne estas, ĉar la kompatinda popolo de Ukrainio devas pagi poste. Ukrainio ne estas riĉa lando. Profitas la miopaj registaroj, ĉar kaj NATO/Usono kaj Rusio havas bonegan laboratorion por provo de novaj armiloj. Eble temas pri la ĉefa militkialo.

Per la milito, Eŭropo liveras al si malaltpostajn laborfortojn ne el la malhelhaŭtaj, fremdulturaj nacioj, de kiuj ĝi pene provas liberiĝi per "fera kurteno", ĉiam traborita. Memoru la skandalan agon de Lukaŝenko, prezidento de Belorusio, ebliganta eŭroopeniron per landlimo kun Pollando!

En la teksto mi notis mension de la suferantaj rusoj, pri kio silentas hipokritaj okcidentaj amaskomunikiloj. Pri rusoj, cetere, forgesiĝas ankaŭ tio, ke en la milito PLEJ suferas ĝuste la loĝantoj de regionoj "helpataj" de Rusio!

Pri disidentoj: Ukrainio, ankaŭ ĝi estas for de demokratio. Ideokratio regas. Ekzemple, la vorto "federacio" tie, ekde 2014 estas insultvorto!

Finfine, la proponon inkluzivigi Rusion al NATO - spite ĝian kadukiĝon post malfondo de Varsovia Pakto - oni sisteme bojkotis kaj kontraŭis. Eŭropanoj perdis

ŝancon krei vastegan pacteritorion! Favore al kiu? Ne pre ne al Eŭropanoj. Laste ankaŭ ne al usona popolo.

Pri Ĉinio kaj Rusio, ambaŭ bone lernis, al kiu servas malpaco inter ili, kion lerte flegis Nixon siatempe.

Eble tamen la mondo venos al plurcentreco, ĉar kaj Ĉinio kaj Usono estas landoj ne-sankcieblaj.

Esperantistoj ne infektiĝu de pormilita propagando. La Movado brile kondukis dum la Unua Mondmilito, eltenis la Duan kun malmultaj stumbloj kaj dece travivis la longan Malvarman Militon ...

Kun bondeziroj,

Luiz Alberto de Oliveira Coelho

(ブラジル) **sur paĝoj de Sumoolegado de Hori Yasuo.**

Kiu estas Luiz Alberto de Oliveira Coelho



brazila dramatikisto, ĵurnalisto, konsultanto de UNESCO - programo pri spirita proksimiĝo de kulturoj. Li vizitis multon da landoj en la mondo. En marto 2016 vizitis denove Pragon post 34 jaroj. Li naskiĝis je la 24-a de aŭgusto 1947 en Rio de Janeiro.

Pliposte estas malfrue ...

La tago komenciĝis ... kaj vesperiĝas. Lundo venis kaj proksimiĝis vendredo ... monato finiĝas kaj jaro baldaŭ finos ... pasis 30, 40, 50 eĉ pli da jaroj de nia vivo. Subite ni ekscias, kiom da homoj ni jam perdis ... gepatrojn, parencojn, amikojn, konatulojn. La tempon oni ne povas revenigi.

Utiligu tempon, kiu restas! Utiligu ĝin laŭplaĉe. Kolorigu nian grizan vivon! Ridetu al aferoj, kiuj karesas niajn korojn. Estus bone pasi tempon, kiu restadas kun fido kaj kviete. Malmemoru la vorton „pliposte“: mi faros tion poste, mi diros tion pliposte, mi pripensos tion pliposte ... ofte ni tiel faras, senpense, sed

pliposte la kafo malvarmiĝas

pliposte prioritatoj ŝanĝiĝas

... sorĉo vaporiĝas

... sano ĉesas servi... infanoj plenkreskos

...gepatroj maljuniĝos

... promesoj estos malmemoritaj

... tago ŝanĝos al nokto

okazos malfruo! La vivo finiĝos. Venos malfruo. Ne lasu, mi petas vin, aferojn farendajn al pliposto, ĉar vi povas perdi la plej belajn momentojn, la plej gravajn minutojn, travivaĵojn kun familio, kun amikoj. La grava momento estas hodiaŭ, en tuja momento. Provu, se nun vi havas tempon, tiun ĉi tekston ĝislegi kaj sendi ĝin al homoj, al kiuj vi nur volas denove diri, ke vi estas dankema, ke ili ĉeestas en via vivo!

Eble vi tion prokrastos?



Ŝtoneca anekdoto

Al bestkuracisto venis sinjorino por konsulti. Ŝi rakontis: „Antaŭ kelkaj jaroj mi alportis malgrandan serpenteton el iu malproksima lando. Mi ŝatis ĝin. Ĝi kutimiĝis kuŝi volvite en mia lito ĉe kruroj kaj kondukis amike. Sed en lasta tempo ĝi konstate kuŝas en lito rekte apud mi kaj tio por mi ne estas komforta, mi ne komprenas. Ĉu vi?“

La bestkuracisto iom pripensis la aferon kaj poste diris: „Estimata sinjorino, ĝi mezuras vin, antaŭ vin ...“

ooooo

Ekzistas vortoj kaj eldiroj en ĉeĥa lingvo, kiujn homoj malmemoris, de kie ili devenis kaj kion ili origine signifis, sed la homoj ilin tre ofte uzas.

„Být v čudu“ – eskapi, vaporiĝi, disfumiĝi. Oni komprenas, ke io aŭ iu malaperis por ĉiam kiel fumo (*čoud*). Sed la eldiro havas ankaŭ alian signifon devenanta el historio. ĈUD estis mallongigo de Bohemia-Moravia kooperativo (*Česko-moravské družstvo*), kiu proponis al civitanoj pruntojn. Unu el manaĝeroj kaj fondintoj defraŭdis posedaĵon de la kooperativo kaj malaperis nekonate kien. Do la klientoj, kiuj perdis monojn eksciis, ke iliaj monoj perdiĝis en „*čud*“.

Mi kaj paĉjo

Mi pasis tutan horon en banko kun mia paĉjo, kiu bezonis transsendi monon. Poste mi demandis lin: „Paĉjo, kial vi ne uzas retbankismon?“

„Kial jes?“

„Nu, poste vi ne devus pasi tempon nur por transsendi monon. Jen, vi povas eĉ aĉetadi rete, ĉio estus pli simpla“, mi estis entuziasme preta lin akompani en mondon de retkonektitoj.

Kaj li demandis: „Kiam mi tion farus, mi ne devus eliri el hejmo?“

„Jes, jes!“ mi diris kaj klarigis, ke li povas mendi hejmen manĝon, eĉ kion ajn.“

Li diris: „Sed hodiaŭ mi iris al banko kaj voje mi renkontis miajn kvar amikojn. Mi interparolis kun oficisto en banko, kiu min nun konas. Pensu, mi nun estas sola kaj tiuj homoj estas socio, kiun mi bezonas. Mi ŝatas eliri hejmon, mi havas sufiĉe da tempo. Estas agrable renkonti homojn. Antaŭ du jaroj mi malsaniĝis. La vendisto, de kiu mi aĉetas fruktojn, vizitis min kaj ploris kun mi. Kiam via panjo falis dum promeno, posedanto de malgranda vendejo veturigis ŝin hejmen, ĉar li sciis, kie ŝi loĝas. Mi volonte konatigos homojn, de kiuj mi aĉetas, kun kiuj mi traktas. Tio estigas rilatojn. Teknologio ne estas vera vivo. Pasi tempon kun homoj estas grava afero.“

Post lia respondo mi ekmeditis.

JoDo.

Psiĥedeloj

Ondřej Koutník, *Seznam zprávy.cz* 7an januaron 2024

Teamo de Jiří Horáček en „Kliniko de psikiatrio kaj medicina psikologio ĉe la Univerzitato de Karlo la Kvara“ en Prago kun ukrainaj institutoj komencis projekton por kuracado de militaj traŭmatoj ĉe soldatoj kaj civitanoj helpe de psiĥedeloj.

Kio estas psiĥedelo ?

Natura halucinogeno (herboj, fungoj, ekstraktoj de ili) aŭ artefarita (sinteza), kiu uzita kaŭzas ŝanĝojn de konscio (travivado de emocioj kaj pensado). La ŝanĝoj tuŝas perceptadon de vido kaj aŭdo. Oni povas „vidi“ muzikon, „flari“ bildojn ...

Investantoj interesas sin

Precipe estas pretaj „*startup*“oj – malgrandaj komencantaj entreprenoj pri teknologio. Unu el ili estas fondinto de „*e-shop BONAMI pri meblo, partnero de grupo MILTON*“ Václav Štrupl, kiu subtenas psiĥedelan klinikon en Prago finance. La kliniko ĉe praga univerzitato estas unu el unuaj klinikoj en EU, kiu realigas t.n. terapion per *ketamin*.

La teamon de Horáček subtenas ankaŭ Bruselo, kie de la jaro 2021 en kadro de „*PsyĥedelicsEŭrope*“ Viktor Chvátal pledas por legalizado kaj uzado de psiĥedeloj en medicina terapio en eŭropa medio.

Mallongite, JoDo, januaro 2024.

La 30an de januaro 2024 mi aŭdis en vesperaj TVnovaĵoj pri grava venenigo de infanoj kaj patrino per sukeraĵoj kun substanco HHC, libere venditaj en publikaj vendaŭtomataj kioskoj. Senkonsciaj infanoj estis urĝe enhospitaligitaj.

Je la 31a januaro mi unuan fojon vidis en centro de nia urbo Mladá Boleslav, kie mi loĝas, brilan novan vendejon de drogaĵoj, kie HHC kaj pluraj aliaj (146 da specoj) de narkotikaĵoj estas ofertataj. En TV mi vespere eksciis, ke sukeraĵoj tie vendataj (ekz. ofte en formo de ŝatataj ursetoj) estas danĝeraj por stiristoj, ĉar kaŭzas dormemon kaj ne estas troveblaj per esploroj de polica kontrolo nek en spiro, nek sango. La ministro de sanzorgo promesas, ke la aferon pripensos. En TV ankaŭ oni hodiaŭ sciigis, ke tiu-ĉi drogaĵo estas malpermesita en Francio, Norvegio kaj Svisio.



Je la 1-a marto la registaro en TV sciigis, ke de 6-a marto HHC estos malpermesita por unu jaro kaj butikoj ĝis tiu dato la drogon rabatas. Butikoj funkcios kun aliaj drogoj (ekzemple Krakom). JoDo.

La DuDek Kvara alvenanta Nin estas strange surprizanta

Jam multajn milojn da Novjaroj
Ni post Decembro ĉiam festas
Kaj ne supozas, ke eraroj
En la surteraj kalendaroj,
Nin konfuzante, trompĉeestas.

Por esti iom pli konciza, –
Jen misinformo tre surpriza:

Septembro – SEP, sepa numero.
Kaj 9 estas ja malvero!
Oktobro – OKTO! Vi komprenas!
Ĉu tio vin plu ne ĉagrenas?
NOVembro kaj DECembro, – respektive
Sonas absurde, false kaj naive.

Ĉu tio estis ŝerca ŝanĝo
De kronikistoj-romianoj?
Aŭ la ordono por aranĝo
De la Potenc-eklezianoj?

Neniu scias, kiu prenis,
Ĉu grekoj aŭ la olda Sparto.
Novjaron IAM ni solenis
Tutmonde en komenc' de Marto!

Laŭ hipotez' astronomia,
Ni estas Ter-Alvenantaro.
Kaj praantikva kalendaro
Atestas nun pri fakto tia.

Malgraŭ io, hej, homaro!
Estu feliĉaj en Novjaro!

Lerneja eksperimento

Instruistino disdonis al lernejoj paperojn kun listo de nomoj de iliaj samlernejoj. Post ĉiu nomo estis spaco. La instruistino petis infanojn, ke ili en la spacon skribu pri la nomita lernanto nur ion bonan.

Poste la instruistino hejme transskribis por ĉiu lernanton, kion la samklasanoj priskribis pri li. Sekvan tagon la instruistino la paperojn disdonis. Infanoj ridetis.

La tempo pasis, infanoj maturiĝis. Venis milito kaj unu el klasanoj revenis en ĉerko. Okazis funebrosolenajo. Venis amaso da homoj. Ankaŭ instruistino. Unu el soldatoj alparolis instruistinon: „Vi estis instruistino de Petro. Li ofte pri vi parolis.“ Alproksimiĝis aliaj eksaj studentoj kaj gepatroj de la forpasinto. La soldato pli parolis: „Petro havis ĉe si la paperon, kiun vi iniciatis.“ Kaj ankaŭ la aliaj eksklasanoj montris sian paperon, kun granda emocio, kiun ili gardis konstante kun fotoj de siaj karuloj.

La eksperimento plene sukcesis, ĉu ĝin sekvi?

JoDo.



Vivo demandis Morton: „Kial homoj amas min, sed vin ili malamas?!”

La Morto respondis: „Vi estas bela mensogo, sed mi nuda vero.“



Jakub Vágner, ĉeĥo, elstara, fama fiŝkaptisto en la mondo skribas 2023 sur sia fejsbuko okaze de novjara parolo:

„Mi vojaĝis tra tuta mondo kaj vidis aferojn bonajn kaj malbonajn, ofte okazaĵojn katastrofajn kaj mi ripetis al mi, denove kaj denove en kia bela, sekura lando mi vivas.

Sed same danke al mia avo mi scias, ke nia nacio ne ricevis tian staton senpene sen sufero. La koston pagis niaj homoj per laborego, per ŝvito, sango kaj vivoj de kuraĝaj homoj, kiuj transdonis al ni tiun ĉi belan landon.

Ju pli mi vojaĝis, des pli mi komprenis, kiel bela kaj agrabla estas nia hejma lando, ke Ĉeĥa respubliko estas paradizo. Dum miaj vojaĝoj mi vidas nur malrapidan kolapson de okcidenta civilizacio. Bedaŭrinde ne nur en malproksimaj lokoj, sed ankaŭ en Eŭropo. Malrapide iom post iom ni lasas nin priŝteli pri nia identeco, kulturo, historio, tradicioj. Ni lasas ekstremajn minoritatojn kaj homojn sen respekto al homeca vivo decidi pri socio majoritata.“





AMO LAŬ SEZONOJ

Ewa Grochowska, Francio

Unua premio por poezio en la literatura konkurso

EKRA Razgrad – 2023

En Printempo nova sento,
Espertempo, milda vento.
La unua renkontiĝo
Ĉe la urba stratkruciĝo.
Kafumado, babilado,
En la parko promenado,
La rigardo korkortuŝa
Decaj troj, kis' senbuŝa.
Kaj subita aminklino
Al flirtema blondulino.

En Somero – la paseroj
Jam ne flugas en aero.
Fojnaromo, ruĝa pomo,
Nudaj korpoj de du homoj.
L'amo venis ja, grandpaŝe
Ili ne plu vivas kaŝe.
Pro pasio, amligitoj
Ŝatas resti en la lito
Kaj karesi sin senĉese
Parolante nur kapjese.

En aŭtuno pala suno.
Amant' rola sen tribuno
Amantino lin atendas,
Pri soleco ofte pledas.
La konsolo – belaj floroj,
Nesufiĉas por la koro.
Dum la arboj senvestiĝas
L'am' en koroj malfortiĝas.
Sur la vitroj pluvmuziko,
Ĉio ŝajnas artifiko ...

Ofte gustas kiel cindro
Retrospekto en la vintro.
Akraj vortoj kaj riproĉoj
Ne plu milde sonas vipoj.
Dom' sen amo, brulodoro,
Venis frostoj kaj doloro.
Nek en lito, nek dum manĝo
Eblas ia pacaranĝo.
En la kvara jarsezono
Venis fino sen pardono.



Sekretoj de kelkaj ĉeĥaj eldiroj

O sto ŝest – pli ol cent ses – signifas fari ion kun ĉiu forto. La eldiro devenas el konata veto de du amikoj en la jaro 1880. Unu el ili vetis kontraŭ la alia, ke ĝis festo de sankta Johano Nepomuk li gajnos koron de amata junulino. Ĝis la festo mankis 106 tagojn. Hodiaŭ oni ekzemple diras: Li drinkas pri cent ses. Li kartludas ol cent ses ...

Jdi do háje! – Iru en boskon! - antaŭe la vorto bosko signifis tombejon, do tre severa frazo! Nun nur milda sakraĵo, kiu ne ofendas.

Houby s octem – fungoj kun vinagro – la eldiro signifas, ke la homo scias pri la afero tute nenion. La signifon oni devas serĉi en Biblio. Soifanta Jezu Kristo sur kruco ricevis de roma soldato por trinki spongon trempitan per vinagro, tute nekonvena por trinki. Tian spongon ĉeĥoj nomas fungo same kiel fungoj en arbaro aŭ sur ligno.

Dávat si bacha – esti singarda, atentema - *Alexandr Bach* estis dum Aŭstro-Hungara imperio kanceliero. Oni lin en Ĉeĥio tre atentis pro danĝero esti arestita. Sed la eldiron oni uzadis eĉ pli frue. Temas pri kriplaĵo de germana vorto "*Obacht!*". En ĵargono de ŝtelistoj ĝi signifis – „Atentu!“

Je to na draka – la afero estas je drako – La deveno ne estas el fabelo. Ĝi denove venis el Germanio, kie ĝi servas kiel sakraĵo „Dreck“ (merdo). Ĉe ni ĝi estas nur konstanto, honeste.

Kout pikle – komploti. Devenas el forĝi „pikel“ - malgrandan mezepokan pikarmilon, per kiu oni povas facile iun enpiki dorsen. Nun oni uzas frazon, kiam iu grupo (ekzemple en parlamento) elpensadas ian obskuran konspiron.

Ĉeĥoj kaj moravanoj uzas diraĵojn ofte, sed devenon de ili malmemoris.

La Unua Tago de Aprilo
Estas Homa ŝercparola Festo
Pere de la laŭdir-"trompilo"
Kun Humoro- kaj Humurĉeesto.
Mi invitas ĉiujn partopreni,
La UnuAprilon ĝojsoleni.

Turkadze

Estis malbela vetero. Ventis kaj vesperiĝis. Nebulis. El funebra aŭtomobilo elfalis ĉerko, el kiu elruliĝis mortinto. Postveturanta ŝoforo ion transveturis. Li haltis, elaŭtiĝis kaj ekrigardis korpon. Li ektimis kaj ĵetis ĝin en maizokampon.

Matene rikoltis maizon kombajnisto kaj vidante korpon, li transportis ĝin en arbustojn.

Postagmeze venis ĉasistoj. Unu el ili vidis ion inter arbustoj kaj pafis. Venis por spekti kaj vidis: homa

korpo. Li konsterniĝis. Alkuris aliaj ĉasistoj kaj telefonis por urĝa servo.

La sekvan tagon telefonis la malfeliĉa ĉasisto al malsanulejo por informi pri sanstato de pafitulo.

La doktoro diris: „La viro estis tre vundita sur diversaj partoj de la korpo, sed li vivos.“

JoDo.

El la libro de MUDr. Tomáš Kašpar

„Ĉu ni mortas laŭ mendo?“ (Umíráme na zakázku?)

2023

Indigno

Indigno kontraŭ maljusto faris juristojn, indigno kontraŭ maleduko faris instruistojn, indigno kontraŭ malsanoj faris kuracistojn.

Sed la problemo nun estas, ke homoj fariĝas ne tiaj el indigneco, sed por ke ili bone fartu, ne pro koleri. Juristoj batalas en flanko, kie ili estas plibone pagataj, ne sur flanko de tiu, kiu pravas. Same iuj homoj fariĝas kuracistoj, ĉar volas havi bonan postenon kaj monon, povon. La malsano estas fonto de profito, necesas ĝin kultivi.

El alia libro de MUDr. Tomáš Kašpar „Ne hastu en ĉerkon“

(Nespěchejte do rakve) 2023

Edukado kaj lernado estas gravaj, ĉar helpas problemojn kompreni kaj elimini erarojn, sed ili tute ne

gravas, kiel oni ĝenerale opinias. La edukado eĉ povas bari trovi veron. Ja, ekzistas multaj trovaĵoj, kiujn malkovris homoj fake nelernigaj, sen diplomoj. Edukado alportas nur informojn, sed ne saĝecon. Ĝi donas al studentoj nur HIPOTEZOJN. Oni devas zorgeme pripensi, kio estas **fakto** kaj kio estas **hipotezo**!

Hipotezo estas nur teorio. Ĝi ne tro valoras, se ĝin ne subtenas faktoj. Faktojn ĉiam subtenas PRUVOJ.

Per scienca maniero oni unue kolektas faktojn, vicigas ilin kaj serĉas interrilatojn. Se iuj faktoj ne kongruas, oni devas serĉi, kie estas misaĵo, eraro. Do, scienca maniero signifas ne preferi teorion kontraŭ faktoj.

Kaj ankoraŭ! Kio estas PRUVO? Pruvo estas kiam io funkcias, kiam ĉiam venas la samaj rezultoj. Oni ne devas scii kial, sed kiam io funkcias, tio estas bona pruvo.

Tamen ekzistas nun fakuloj kaj sciencistoj, kiuj argumentas ekzemple pri kuracherboj, dietoj, diversaj popolaj kuracmanieroj kaj registaro malpermesas malgraŭ bonaj efikoj uzi ilin. Mi asertas, ke se iu rifuzas faktojn, kiuj ne kongruas kun ĝisnunaj teorioj aŭ simple oni ne kredas pri ili, tiu homo estas nek ĝusta fakulo, nek sciencisto, sed fanatiko, ĉar fanatikulo neniam akceptas veron, ke li eraras. Tiu homo estas danĝera kaj se li estas medicinisto eĉ du foje pli.

Aŭ ... li intencas alion, ol li asertas.

Antaŭ vi staras demando: Al kiu kredi?? Jen, via problemo ...

El alia loko en la libro

La plej forta kaj danĝera drogo en la mondo ne estas LSD aŭ heroino, ĝi estas **POVO!** Sapiro pri povo!

Kiu subigas al drogaĉoj, volentas konduki kruele. Virinoj vendas siajn korpojn, viroj animojn, ĉiuj sian karakteron, personecon, sian liberon. Sapiro pri povo eĉ pli enorma. Tiu homo volentas fari ĉion ajn kaj oferi iun ajn. Ne ekzistas fiaĵo, kiun tia homo ne farus. Sapiro pri povo respondas pri preskaŭ ĉiuj militoj, subpremo, ĉiu mizero. Sapiro pri povo faras el medicina scienco politikan aferon.



Lingva diverseco estas malfacile administrebla

Post ĉirkaŭ dudek jaroj de la politiko de lingva diverseco, en 2019 la ŝtatestroj konstatis, ke tiu politiko

ne estas efika. La Konsilio de Eŭropa Unio oficiale deklaris: "Nur kvar lernantoj el dek en meza edukado atingas la nivelon de "sendependa uzanto" en sia unua fremda lingvo, tio signifas kapablon simple konversacii. Nur kvarono de lernantoj atingas ĉi tiun nivelon en la dua fremda lingvo".

Tiu neesto de komuna lingvo malutilas demokration, sed ankaŭ ekonomian kaj socian efikecon. Civitanoj ne povas debati. Firmaoj apenaŭ povas kontakti siajn eblajn provizantojn aŭ klientojn en aliaj eŭropaj landoj. Sindikatoj ne kapablas organizi komunajn agojn je la nivelo de Eŭropa Unio. Eŭropa Unio estas en malavantaĝo kompare kun grandaj konkurantaj grupoj kiel Usono kaj Ĉinio.

EDE-Francio, 2024 gazetara komuniko

Hodiaŭ ni ne havas tempon, Morgaŭ ni ne havos forton kaj postmorgaŭ estos malfrue.

Prokrastu nenion! Ni vivas reale nur nun.

Infano tenanta en la manoj florzon senfloran

ĉina legendo, rerakontis Ji Yin'geng.

memore al nia bedaŭrata leganto s-ro Ji Yin'geng en Ŝanhajo, Ĉinio - eldonite en marto 2024 en monata gazeto „INFORMILO“ de Asocio de Handikapitaj Esperantistoj.

Longe longe antaŭe vivis saĝa reĝo, sub kies gvido la lando estis prospera kaj la popolo vivis en paco. En sia maljuneco al li mankis nenio, sed bedaŭrinde li havis nek filon nek filinon. Iutage li pensis: „Mi selektu plej honestan infanon en la tuta lando kiel mian infanon.“

Li preparigis multe da florsemoj kaj ordonis al sia subulo, por ke li disdonu la florsemojn al ĉiuj infanoj en la tuta lando, al ĉiu po unu, kaj diru al ili, ke tiu, kiu elkultivos plej belan floron el la ricevita florsemo, fariĝos la filo aŭ filino de la reĝo.

Ĉiuj infanoj enterigis la ricevitan florsemon en sian florzon kaj akvumis ĉiutage. Ankaŭ YAO Qiang atente prizorgis sian florsemon. Bedaŭrinde, pasis dek tagoj, pasis dek kvin tagoj, pasis monato, sed la florsemo en la tero neniam ĝermis. „Strange!” li pensis kaj ne sciis kial. Finfine li iris demandi sian patrinon: „Panjo, kial mia florsemo ne ĝermis?” La patrino ankaŭ ĉagreniĝis pri la afero kaj elbuŝigis: „Ŝanĝu la florzon kaj la teron en ĝi kaj provu enterigi refoje.”

YAO Qiang ŝanĝis la florvazon kaj la teron en la florvazo kaj enterigis la florsemon denove kiel lia patrino diris, sed la florsemo ankoraŭ kiel antaŭe ĉiam kuŝis en la florvazo kaj neniam ĝermis.

Venis la tago, kiam la reĝo rigardu la florojn. Multe kaj multe da infanoj de la tuta lando alvenis al la ĉefurbo kaj viciĝis ĉe strato apud la reĝa palaco kaj atendis, por ke la reĝo rigardu la freŝajn florojn. Ili ĉiuj portas belegajn vestojn kaj en la manoj tenas florvazon, en kiu freŝa floro pompe disvolviĝis. Ĉiuj volas fariĝi la filo aŭ filino de la reĝo kaj heredi la tronon. Sed kial? Kial la reĝo, rigardante la florojn, preterpasas la infanojn unu post la alia kaj survizaĝe aspektas malĝoja?

Abrupte la reĝo vidis, ke YAO Qiang je la vosto de la vico tenas en la manoj florvazon sen-floran. La reĝo ordonis sian sekvanton, por ke li venigu YAO Qiang. Kiam YAO Qiang alvenis, la reĝo demandis: „Kial vi tenas en la manoj la florvazon sen floro?”

YAO Qiang rakontis al la reĝo, kiel li enterigis la florsemon, sed bedaŭrinde, ne scias, kial la florsemo neniam ĝermis, eble oni punos lin, ke li ŝtele ŝiris pomon sur la pomujo de najbaro iufoje. Aŭdinte, la reĝo, preninte al li la manon, ĝoje diris: „Vi estas mia honesta filo.” Sur la strato tuj ekbolis tumulto. „Kial la reĝo rigardas la infanon tenantan en la manoj florvazon sen floro kiel sian filon?” oni flustradis. La reĝo eksplikis al la ĉeestantoj: „Miaj patrolandanoj, la

florsemoj, kiujn mi disdonis al la infanoj, estis sufiĉe kuiritaj.” Ĉiuj do jese balancis la kapon. Tiuj infanoj, kiuj tenis en la manoj florzakojn kun freŝa floro, ruĝiĝis de honto, ĉar ĉiuj iliaj freŝfloroj estis kultivitaj de aliaj florsemoj. Ekvidinte tion la reĝo sincere diris: „Infanoj, erari ne estas grave, grave estas memscie korekti la eraron. Mi esperus, ke vi ĉiuj fariĝos honestaj infanoj.”

Ree ĉiuj ĉeestantoj jese balancis la kapon.

El la Novaĵoj Tamtamas n-ro 387/6/2023



RECENZO

Legajoj amuzaj kaj klerigaj – Zamenhofa afero plu vivas

Esperanton lernas homoj scivolemaj, kun larĝa menshorizonto. Por reteni komencantojn en Esperanto-komunumo necesas ilin interesigi kaj konstante klerigi. Esperanto estu nemalhavebla kanalo por konatiĝi kun valorajoj de monda kulturo, por ekscii – en oportuna formo – novaĵojn de scienco, gravajn informojn plej diversspecajn, kaj ankaŭ – por simple amuziĝi. Tion bone komprenis jam Zamenhof mem. En

“Fundamenta Krestomatio” (1903) troviĝas ne nur beletraĵoj originalaj kaj tradukitaj, fabeloj kaj legendoj de diversaj popoloj, filozofiaĵoj, sed ankaŭ facilaj sciencpopularaj artikoloj, kaj – simplaj anekdotoj. La Fundamenta Krestomatio estis multfoje reeldonita kaj restas valora – tamen, nun tiu valoro estas ĉefe historia.

Dum cent jaroj okazis multegaj eventoj, la monda kulturo grave pliriĉiĝis, sciencoj kolose progresis. Bezonatas novaj krestomatioj, kaj certe ne eblas enmeti ĉion indan en unu volumon.

Pri tio modele zorgas ĉeĥa E-aktivulino Jindřiška Drahotová. En 2003-2016 ŝi komplilis kaj eldonis 12 kajerojn de “Legolibretoj”. Post 2016 la serion daŭrigas “Legajoj”: ĝis nun aperis naŭ 100-paĝaj volumetoj.

S-ino Drahotová trovas interesajn materialojn en diversaj E-revuoj, tradukas elektitajn artikolojn el ĉeĥa gazetaro, multe verkas mem; en preskaŭ ĉiu volumeto troveblas ankaŭ verkoj (fragmente, se la verko longas) de niaj elstaraj literaturistoj: Kálmán Kalocsay, Tibor Sekelj, Sten Johansson, István Nemere k.a. Ĉio legeblas facile, la pecoj malofte superas unu paĝon. La enhavo tre varias. Ekzemple, en la 9-a volumo de “Legajoj” oni trovas “Dek konsilojn por sukcesi kaj atingi viajn celojn”; prezenton de mezepoka filozofo R.Bacon kun citaĵoj el liaj verkoj; konsilojn kiel eviti demencon kaj kiel trakti demenculojn; mallongajn rakontojn – realajn kaj elpensitajn por ŝerci; priskribojn de vidindaĵoj diverslandaj... kaj multon alian.

Estas vere tre plaĉaj kaj utilaj libretoj. Sola bedaŭrindaĵo estas ĝenaj preseraroj – iam eĉ en la nomoj de aŭtoroj. Ja, ĝuste en libroj por komencantoj oni devas esti aparte atenta kaj zorgema pri ĝusta ortografio.

Valentin Melnikov, Rusio

ENHAVO




3. Sur la kajo, Tomáš Beník, Ĉeĥio
4. Vendisto de la feliĉo, Julian Modest
7. Feliĉaj maljunuloj, JoDo
9. Globkrajono, Wikipedie
10. Karaj verdaj raŭpoj, karaj papilioj, Hori Jasuo
12. Venenaj plantoj, Oldřich Arnošt Fischer
14. La kvina gusto, J. Drahotová
15. Kiel mi pasis dimanĉon, Jarka Malá
16. Kiam la ulino malŝtraŭbas vian cerbon, Bardhyl Selimi
17. František Drtikol (1883 – 1961)
18. Pastro František Ferda (1915 – 1991)
20. Konversacio kun Ajnŝtajno, Timo Ffloko, albano
21. Vortoj de PhDr. VLASTIMIL VONDRUŠKA, CSc.
22. Vivmotivoj aŭ kial mi faras tion ĉi, JoDo
23. Tragedio en universo, Turkadze
24. Plibonigita ŝernado de lingvoj por pli justa Eŭropo
25. Blato komuna, kutime en hoteloj, Jana Veselá
26. Ĉu la irlanda estos rekonita? Garbhan MacAoidh, Monato
27. Magyar törzs Afrikában, Lajosné Czikkely
29. Adaptado de romaoj – dornoplana vojo, Oldrich Fischer
36. Sekreto? Sekreto de najbaroj?? J. Drahotová
39. Sekreto de niaj najbaroj, Blanka Hužerová
41. Pri sukero, katoj kaj mondo, noveloj, Anna Striganova
43. Nokta aventuro, Aleksander Korĵenkov
48. Jen eta raporto pri 108-a UK en Torino, Edmond Ludwik
50. La perfekta virino ... Sylvain Lelarge
52. Ĉu vi scias, ke oni povas planti arahidojn hejme?
53. Eta kafa lukso, Sooyoung Oh, Koreio, Kuriero
54. La letero de Boulton al Jasuo

- 55. Kio estas esperantisto? Honoré Sebuhoro
- 56. Mobilkoj, Marian Zdankowski
- 61. Legendo el norda Bohemio, Pri du fratoj
- 62. Legendo el norda Bohemio, Pri pano por mizeruloj
- 66. Princo amanta mavan Reĝinon, Jan Šik
- 71. Feliĉa insulo, Juna Amiko
- 72. Unuflanka vidpunkto, anonimo
- 73. Pri kvantuma traĵo, Leonid Turkadze
- 74. La homo naskiĝis kun gestoj, Nova Urbo
- 76. Intervjuo kun Barghyl Selimi
- 77. Luiz Alberto de Oliveira Coelho
- 79. Pliposte estadas malfrue ...
- 80. Anekdotoj
- 82. Psiĥedeloj, JoDo
- 84. Ni estas strange surprizanta ... sendis Turkadze
- 85. Lerneja eksperimento
- 86. Jakub Vágner, novjaraj vortoj 2024
- 87. Amo laŭ sezonoj, Ewa Grochowska, Francio
- 88. Mi kaj paĉjo, JoDo
- 89. Sekreto de kelkaj ĉeĥaj eldiroj, JoDo.
- 91. Unua tago de aprilo,
- 91. El la libro de MUDr. Tomáš Kašpar, Ne hastu en ĉerkon
- 94. Lingva diverseco estas malfacile administrebla
- 95. Infano tenanta senfloran poton, Ji Yin'geng, Ĉinio.

Dankon al ĉiuj, kiuj helpis, al tiuj, kiuj legas



OFERTO



kaj dekojn beletraĵojn en origine verkitaj en Esperanto kaj tradukitaj al ĉeĥa lingvo mi povas sendi rete.

drahotova@esperanto.cz.

